



**ESPERANTO**

**JUNIO 1962**

55a Jaro - N-ro 679 (6)



# esperanto

J U N I O 1 9 6 2

5 5 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 679 - (6)

Fondinto : H. HODLER

**Cion por la redakcio** oni sendu al la Redaktoro : W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa. (Clackmannanshire), Skotlando.

**Cion pri administrado de UEA** kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono : (010) 32788. Ĝirkonto: 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

**Ciu materialo por difinita numero** devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

**Bankisto de U.E.A. :**

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

**Traduko kaj represo** de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

**Jara abono (1962) :** 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

**Tarifo por reklamoj :**

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

**Anoncetoj pri korespondado :**

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

**Legantoj en pli ol 80 landoj.**

**Estrarar de U.E.A. :**

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

**Serva Centro:** ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

**LA FRONTPAĜA BILDO :**

La domo de Jens Bang en Aalborg.

## Enhavo

|                                                         |     |
|---------------------------------------------------------|-----|
| Universalaj Kongresoj . . . . .                         | 101 |
| Dana sinteno al la evolulandoj . . . . .                | 102 |
| La scienco de la paco . . . . .                         | 103 |
| Kiel mi eniris parnason . . . . .                       | 105 |
| Enkonduko de Esperanto nun ! . . . .                    | 106 |
| La klifoj ĉe Dover . . . . .                            | 107 |
| Aŭtoroj, amatoroj, diletantoj<br>kaj barbaroj . . . . . | 108 |
| Pri Mori Oogai, japana verkisto . . . .                 | 110 |
| Virinoj levas siajn voĉojn por paco . .                 | 112 |
| Miopega decido . . . . .                                | 113 |
| Krucvortenigmo . . . . .                                | 113 |
| <b>Rubrikoj</b>                                         |     |
| La internaciaj konkursoj 1962 . . . . .                 | 102 |
| Ŝaka rubriko . . . . .                                  | 104 |
| Nia forumo . . . . .                                    | 109 |
| Ricevitaj libroj . . . . .                              | 111 |
| La Juna Vivo . . . . .                                  | 114 |
| Tra la mondo . . . . .                                  | 115 |
| 47a U.K. . . . .                                        | 117 |
| Oficiala Informilo . . . . .                            | 118 |
| Radio . . . . .                                         | 120 |

**Manuskriptoj** por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

**OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

# UNIVERSALAJ KONGRESOJ

Ĉiujare en la mondo okazas centoj da internaciaj kongresoj aŭ kunvenoj, kies temoj ampleksas la plej diversajn kampojn de la homa intereso: de la komerco al la scienco al la politiko. Dum tiuj ĉi kongresoj tuŝas nur unu temon, la programo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto kontraŭe enhavas la plej variajn temojn, ĉar en ĝi troviĝas kunvenoj de juristoj, de ĵurnalistoj, de instruistoj, religiaj, sciencaj kaj multaj aliaj.

Tio estas kio diferencigas niajn Universalajn Kongresojn de la aliaj, krom la uzo, kompreneble, de unu sola lingvo.

Pro kio estiĝis la Universalaj Kongresoj de Esperanto? La ĉefa celo de la esperantistoj, kiuj kunvenis ekde Boulogne-sur-Mer, estis konvinki la neesperantistojn — kaj ne malpli sin mem — ke Esperanto estas vivanta lingvo.

Same grava kaŭzo por kunveni estis, por la plejmulto el la tiutempaj esperantistoj, la bezono renkonti — almenaŭ unu fojon en la jaro — aliajn homojn, kun kiuj paroli la Internacian Lingvon.

Dum tiuj ĉi pli ol 50 jaroj la graveco de la Esperanto-Movado plifirmigis kaj konsekvence la Universalaj Kongresoj evoluis de simpla renkontiĝo al unu el la plej gravaj nuntempaj internaciaj kongresoj.

Universala Esperanto-Asocio plifirmigis ĉie sian pozicion kaj la nova karaktero de la konsultaj rilatoj kun Unesko donas al ĝi ankoraŭ pli da eblecoj.

Esperanto ekpenetris en la mediojn de la scienco, de la komerco, de la instruado.

Ĉion ĉi konsiderante, evidentiĝas ke la diskonigo de Esperanto ne plu estas la esenca celo de la Universalaj Kongresoj, kiel estis en la unuaj tempoj, kvankam ankoraŭ multo estas farenda en la kampo de la informado.

Nuntempe la Universalaj Kongresoj havas en siaj programoj ankoraŭ raportojn kaj diskutojn pri la problemoj de la Esperanto-Movado, sed ili donas nun ankoraŭ la okazon kunveni al fakuloj, kiuj uzas la Internacian Lingvon por pritrakti siajn fakajn problemojn.

Malgraŭ la daŭra plivastiĝo de Esperanto, ankoraŭ multaj esperantistoj estas izolitaj, sen iu ajn rekta kontakto kun aliaj. Por ke tiuj homoj havu la eblecon kontakti kun la cetera esperantista mondo, por ke ili estu rekte informitaj pri

la evoluo de la Esperanto-Movado, por ke ili ricevu novan forton kaj instigon por pli disvastigi la Internacian Lingvon en siaj loĝlokoj, la Universalaj Kongresoj de Esperanto estas la sola okazo en la jaro.

Kiel mi jam supre diris, la Universalaj Kongresoj evoluis en la daŭro de la jaroj, ĉu rilate la gravecon ĉu rilate la amplekson de la programo — en la lastaj jaroj ĝi enhavis pli ol 100 erojn.

Al tiu ampleksigo kontribuis ne nur la diversaj fakaj kunvenoj, sed ankaŭ la prelegoj de la Internacia Somera Universitato, unika manifestacio, pri kiu la esperantistaro povas prave fieri, kulturaj aranĝoj, kiel ekz. la lastjara Unua Internacia Arta Festivalo, aŭ la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, kiu okazos ĉijare en Kopenhago, kaj al kiu partoprenos tre verŝajne ankaŭ neesperantistaj sciencistoj, konkursoj belartaj kaj oratoraj.

Ankaŭ flankaj aranĝoj kontribuis por ke la programo de la Universalaj Kongresoj fariĝu pli ampleksaj, kiel ekz. la Internacia Junulara Kongreso, la Internacia Kongreso de Blinduloj, la Cseh-Seminario, kiun ĉijare, laŭ la intencoj, partoprenos lernantoj de porinstruistaj seminarioj. Ankaŭ tre grava kaj interesa manifestacio en la kadro de la Universalaj Kongresoj estas la Infana Kongreseto, kiu akceptas esperantistajn infanojn de 6 ĝis 13-jaraj.

Kompreneble la Universalaj Kongresoj ne donas al la partoprenantoj nur laborkunsidojn kaj kulturajn aranĝojn, sed ankaŭ distrajn kaj agrablajn programerojn, kiel ekskursojn, teatrajn vesperojn, balojn — unu por ĉiuj kongresanoj kaj unu por la gejunuloj —, bankedojn, filmprezentadojn, ktp., ĉar la kongresa semajno, por la plejmulto, estas feria tempo.

En Kopenhago, ekzemple, la Internacia Arta Teatro, trupo konsistanta el diversnaciaj geaktoroj, donos prezentadon en la plej moderna teatro en Kopenhago. Dum la oficiala balo estas la intenco de la organizantoj elekti la "Princino de la Balo" inter la multaj ĉarmaj kongresaninoj.

Laborkunsidoj kaj ekskursoj, prelegoj kaj teatraĵoj, fakaj kunvenoj kaj distraj vesperoj: ĉio ĉi troviĝas en la programo de la Universalaj Kongresoj. Ĉiu kongresano povas trovi en ĝi tion, kio lin interesas.

G. G. Pompilio



# DANA SINTENO AL LA EVOLULANDOJ

(Verkita speciale por „Revuo Esperanto”)

Viggo Kampmann

Ĉefministro de Danlando

En Danlando ni rekonas, kiel oni ankaŭ faras en aliaj okcidenteŭropaj landoj, ke la evoluo en Afriko kaj Azio estas vere grava. Ni rekonas, ke la evoluo en tiuj mondpartoj, kie estiĝis multaj ŝtatoj post la fino de la dua mondmilito, estas demando, kiu ne nur nuntempe, sed kiu precipe en la estonteco influos definitive la stabilecon de la internacia evoluo. En la teknike altevoluintaj landoj oni rekonas, ke la espero pri paca estonteco estas intime ligita al la ebloj levi la novajn teknike neevoluintajn landojn sur nivelon pli altan, levi ilin tiel, ke la materiaj kaj ekonomiaj diferencoj inter la landoj malpligrandiĝas.

Plibonigo de la ekonomia kaj teknika stato kaj per tio ankaŭ plibonigo de la vivnivelo en tiuj novaj afrikaj kaj aziaj landoj necesigas kompreneman kaj plenfidan kunlaboron inter ni helpantoj kaj tiuj landoj, kiuj ricevos helpon.

Mi kredas, ke en tiu kunlaboro tre valoras tio, ke demokrataj pensoj komuniĝas al la novaj landoj, ke pensoj bazitaj sur respekto al la kunhomo kaj al ĝia rajto vivi en libereco komuniĝas al tiuj novaj landoj, kiuj jam nun ludas kaj post kelkaj jaroj ludos gravan rolon en la internacia politiko.

Niaflanke ni povas nur ĝoji, ke memstareco kaj libero ricevas plej favorajn cirkonstancojn en kiel eble plej multaj landoj. Vivoformo bazita sur demokrateco estas plej solida garantio por kvieta evoluo en la mondo.

Estas ĝojige vidi, ke la dana loĝantaro, kaj ne malpli la dana junularo, klare komprenis la karakteron kaj grandecon de tiu defio, kiun la problemoj en tiuj novaj landoj reprezentas al ni, kiuj havas la privilegion vivi en bonaranĝita kaj en la plej multaj rilatoj solide fundamentita socio.

En nia kunlaboro kun la evolulandoj ni deziras substreki la signifon de tio, ke unuavice la helpo estas perata de Unuiĝintaj Nacioj. Ni kredas, ke la administrado de tiuj taskoj povas kontribui al plifortigado de tiu signifoplena mondorganizo kaj ĝia prestiĝo ĉie en la mondo. Sed samtempe ni atentigis, ke en certaj okazoj povus esti tre valore krei inter Danlando kaj certa evolulando rektan kunlaboron pri konkretaj taskoj. Parte tio povas ĉi-tie en Danlando plifortigi la intereson pli certa evolulando kaj ĝiaj problemoj, kaj parte tio povas evidentigi klare difinitajn videblajn rezultojn atingitajn per dana helpo. Laŭ mia opinio tre valoras havi ion konkretan por elmontri en klari-

gado kaj fundamentado de tio, ke vere utilas ekonomie subteni la monkolektadojn por la evolulandoj.

La monkolektado, kiu nuntempe realiĝas en Danlando, ricevas apogon de ĉiuj flankoj en nia loĝantaro, kaj ĝojiga afero estas, ke unuavice tio okazas surbaze de vere homecaj motivoj. Sed mi kredas, ke pli kaj pli da homoj konscias ankaŭ pri la longtempa tasko fari ligojn inter la novaj kaj malnovaj landoj, inter la novaj malriĉaj landoj, kiuj bezonas helpon, kaj la pli progresintaj landoj, kiuj sen malaltigo de vivnivelo kapablas doni tiun helpon.

## LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1962

Stato je la 30-a de aprilo

### Konkurso I

|     | Lando      | Kvoto | Poentoj | %     |
|-----|------------|-------|---------|-------|
| 1.  | Nederlando | 4942  | 4713    | 95,37 |
| 2.  | Usono      | 3610  | 3435    | 95,15 |
| 3.  | Francujo   | 6754  | 6267    | 92,79 |
| 4.  | Hispanujo  | 2557  | 2300    | 89,95 |
| 5.  | Svislando  | 2103  | 1795    | 85,35 |
| 6.  | Svedujo    | 6190  | 5205    | 84,09 |
| 7.  | Finnlando  | 2525  | 2120    | 83,96 |
| 8.  | Britujo    | 6661  | 5545    | 83,25 |
| 9.  | Italujo    | 4253  | 3310    | 77,83 |
| 10. | Belgujo    | 2006  | 1545    | 77,02 |
| 11. | Danlando   | 2876  | 2083    | 72,43 |
| 12. | Germanujo  | 7085  | 4870    | 68,74 |
| 13. | Norvegujo  | 1677  | 1110    | 66,19 |
| 14. | Brazilo    | 4142  | 2613    | 63,09 |
| 15. | Japanujo   | 3265  | 1575    | 48,24 |
| 16. | Jugoslavio | 5560  | 1470    | 26,44 |

### Konkurso II

|     | Lando       | Kvoto | Poentoj | %      |
|-----|-------------|-------|---------|--------|
| 1.  | Argentino   | 505   | 715     | 141,58 |
| 2.  | Aŭstrujo    | 1440  | 1355    | 94,10  |
| 3.  | Portugalujo | 515   | 460     | 89,32  |
| 4.  | Aŭstralio   | 1148  | 1003    | 87,37  |
| 5.  | Israelo     | 285   | 240     | 84,21  |
| 6.  | Kanado      | 746   | 590     | 79,09  |
| 7.  | Sudafriko   | 250   | 185     | 74,—   |
| 8.  | Islando     | 250   | 145     | 58,—   |
| 9.  | Urugvajo    | 250   | 105     | 42,—   |
| 10. | Madagaskaro | 250   | 95      | 38,—   |
| 11. | Nov-Zelando | 1184  | 390     | 32,94  |



# LA SCIENCO DE LA PACO

Malsano kaj tro frua morto estas efike konkeritaj dank' al la atingoj de la medicina scienco. Diversaj branĉoj disvolviĝis kaj strebas al sanigo de la homa individuo kaj al prevento de lia malsaniĝo.

Kiu scienco strebas al la sanigo de la homa socio? Jes, ekzistas sciencoj kiuj okupas sin pri ĝi: la historio, la juro kaj la sociologio, sed ĝis nun mankis aparta scienco pri la plej granda malsano de la homa societo, la milito, kvankam la internacia juro sin okupas pri ĝiaj prevento kaj reguligo.

En 1960 okazis en Amsterdam internacia kura-cista kongreso, kiu traktis la profilaktikon de la milito. Rezultis el ĝi la fondo de Instituto por Militprofilaktiko en Amsterdam, kiu kunordigas diversajn sciencojn por studi la pacon. Ĝia sekretario dissendis al ĉiuj universitatoj en la mondo invitojn por starigi katedrojn por irenologio, la scienco de la paco.

En la ŝtata universitato en Groningen (Nederlando) la profesoro pri la internacia juro, prof. d-ro mag. B. V. A. Röling, iniciatis en 1961 la starigon de instituto por la studo de la milito; ĝi celas preventi la militon. Ĝia nomo estas Polemologia Instituto, laŭ la greka nomo "polemos" por milito.

Unu el la plej grandaj ĵurnaloj "Het Parool" publikigis la 10-an de marto 1962 intervjuon kun profesoro Röling kaj permesis al mi ĉerpi el ĝi la sekvontan:

Aŭtoritataj Amerikanoj diris ke, se ni daŭrigas tiel kiel ni faras, antaŭ 1975 okazos katastrofo. Raporto de la "Pentagon"<sup>1)</sup> el 1958 mencias ke nova mondmilito — temas pri limigita milito — kaŭzos la morton de 160 milionojn da Amerikanoj kaj de 200 milionoj da Rusoj kaj ke neniu Eŭropano postvivus tiun militon. Estas klare ke oni devas preventi la militon. Sed kiel estiĝas milito, kiaj anstataŭiloj por ĝi ekzistas? Pri tiuj kaj similaj demandoj okupas sin la polemologio.

La Polemologia Instituto speciale celas, ke ĉiaj sciencoj direktu sin al la studo de la fenomeno milito: la juro, la ekonomio, la sociologio, la psikologio, la antropologio kaj diversaj aliaj. La temo jam estas multe studita, sed prof. Röling opinias ke oni povos atingi ion pli per kunlaborado.

La instituto studas almenaŭ kvar punktojn. Unue la fenomenologion de la milito, ĝian aspekton. Pri tio ekzistas multe da sekreto. Pri bakteriologiaj kaj kemiaj armiloj ni preskaŭ nenion scias. Pri la nuklea fiziko ni tamen scias multon, sed restas la demando studota: kiel aspektos la venonta milito?

Dua demando estas: kio estas la funkcio de la milito? Ĉu ĝi efektive havas funkcion? Prof. Röling opinias, ke ĝi iam havis kaj pli kaj pli perdis ĝin. Tio speciale koncernas la okcidentan mondon, sed oni povas imagi, ke milito en Afriko, kie gentoj intermilitas por atingi aliajn politikajn aranĝojn, povus ankoraŭ havi funkcion.

Tria temo estas la esploro de la kaŭzoj de la milito. Kio estas la puŝantaj fortoj? Ĉu la ekonomiaj faktoroj estas decidaj? Aŭ ĉu la naciismo estas pli grava? Ĉu la milito estas kaŭzata de sentoj de frustrigo<sup>2)</sup> aŭ de deziro al aventuro? Freud iam diris, ke la ŝanco por milito pligrandiĝos kun la kreskado de la kulturo.

Kiel kvara punkto ekzistas la problemoj pri la anstataŭiloj. Ni staras antaŭ la neceso serĉi anstataŭantan rimedon por la milito kaj la militminaco. Tio fakte estas la plej granda problemoj kaj juristoj jam longe okupas sin pri ĝi: pacaj ŝanĝoj kaj konservo de la paco. Ĉu tio estas ebla?

Ĉefafero estas, ke ni kun la atombomboj sur Hiroŝima kaj Nagasaki iasence naive eniris la atomepokon. La homaro nun disponas pri tiom granda eksterma kapacito, ke ni nepre devas atingi tute alian mondorganizon. Tio estas grandega tasko, interalie ĉar la granda amaso da homoj por tio tro malmulte interesiĝas. Ĝuste pro tiu indiferenteco la spirito de la naciismo daŭras, kio tiel facile kondukas al provoka politiko kaj milito. La scienco instruu kiel alproksimiĝi al la popola amaso. Tra pli bone ekkonitaj opinioj, ĉie en la mondo iĝos eble por la registaroj plenumadi konstruan politikon.

La fiasko de la granda pacifisma movado inter la du mondmilitoj forte frapis prof-on Röling. Tiutempe oni malmulte komprenis, ke la popola amaso devus favori tiun strebadon.

Unu polemologia instituto tamen ne helpas multe. Sed ili jam stariĝis ĉie. En Usono ekzemple laboras en la sama direkto la "U.S. Agency for Arms Control and Disarmament" (Usona oficejo por Kontrolo pri Armiloj kaj Senarmigo). Ĝi disponas pri buĝeto de 6 milionoj de dolaroj. Usono tamen ĉiujare elspezas 50 miljarde dolaroj por sinarmado.

Prof. Röling ekhavis en 1962 la konstantan helpon de profesoro pri la sociologio de internaciaj rilatoj. Kolegoj kaj aliaj specialistoj konsistigas multflankan konsilantaron. Li esperas, ke 10-20 konstantaj kunlaborantoj enhavos la okazon kune profundigi la scion pri milito kaj paco.

Prof. Röling intencas organizi landajn konferencojn pri milito kaj paco, por disvastigi tiujn pro-

<sup>1)</sup> Federacia ministrejo por militaj aferoj en Washington.

<sup>2)</sup> Psika rezulto de seniluziigo aŭ trompiĝo.



blemojn al la popolamasoj. Estas facile veki interesiĝon. Inter la Groningaj studentoj estas tiom granda interesiĝo pri la temo, ke la plej granda lekciejo estis tro malgranda: multaj devis aŭskulti en la koridoro.

Antaŭ nelonge mi vizitis profesoron Röling kaj havis okazon atentigi lin pri du faktoj, kiuj povus progresigi liajn klopodojn. Unue, ke por establi la necesan internacian komprenon inter la popolaj amasoj, Esperanto evidentiĝis efika rimedo; due, ke la Esperantistaro jam pensas trans ŝovinismaj limoj en kategorioj de monda kunvivado kaj tial emas helpi al la disvastigo de liaj ideoj. La profesoro malmulte sciis pri Esperanto, kredis la

anglan lingvon taŭga por internaciaj celoj kaj estis skeptika antaŭ la pretendoj de Esperanto.

Estas grave ke ĉiuj instruituloj, kiuj sin okupas pri aferoj celantaj al harmoniigo de la internacia vivo, ekkonu la signifon de Esperanto. Tio validas ankaŭ por koncernaj organizaĵoj kiaj ekz. la "World Centre for Peace Technology" (Monda Centro por la Tekniko de la Paco) fondita en 1961 en la Universitato de Cleveland en Ohio (Usono) kaj la Komitato Pugwash, superpolitika komitato el sciencistoj de la tuta mondo, fondita sekve de la minaco de la atommilito en la Kanada urbeto Pugwash.

G. F. Makkink

## Ŝaka Rubriko

(Gvidas: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

### PROBLEMA KONKURSO 1961

Per la 7a problemoj, publikita en nia decembra numero, finiĝis nia konkurso 1961. Entute ĝin partoprenis 75 gesamideanoj el 27 landoj. Ili sendis 280 solvojn, el kiuj 251 estis ĝustaj. Plej multe da partoprenintoj estis el Germana federacia respubliko kaj el Pollando — po 10, kaj el Francujo — 9. La plej aktiva partopreninto estis nederlando samideano, s-ro W. Meijns el Wormerveer, kiu kun unu sola escepto estis ĉiam la unua, kiu sendis sian solvon. En la konkurso estas reprezentataj ĉiuj eŭropaj landoj kun escepto de Jugoslavio (!!), Norvegujo kaj Svislando. Ĝojiga estas partopreno de samideanoj el malproksimaj landoj: Argentino, Brazilo, Ĉinujo, Gvatemalo, Israelo, Kanado kaj Usono.

En ĉiuj 7 problemoj oni povis atingi 18 poentojn. Tion sukcesis entute 22 partoprenintoj: Adán Hryniewicz (Argentino), C. Meeus, R. Iserentant (Belgujo), inĝ. L. Jordanov (Bulgarujo), V. Kvist, E. Starup-Jensen (Danlando), J. Duthilleul, R. Leger (Francujo), B. Fischer, H. Rössler, G. Schikorski, H. Schindelbauer (Germana federacia resp.), Fr. Gimenez, E. Maynar (Hispanujo), B. B. Skaffell (Islando), W. J. Maier (Kanado), W. Meijns, J. H. Morreau, f-ino C. Brinkmann (Nederlandoj), W. Nastaj (Pollando), inĝ. R. L. Welther (Rumanujo), T. Lindberg (Svedujo). 16 poentojn gajnis D-ro C. A. Wutke (Brazilo), po 15 poentoj gajnis K. Ridder (Germana federacia resp.), inĝ. T. Restaino (Italujo), 13 poentojn gajnis K. Tyminski (Pollando), po 12 poentoj H. Laine (Finnlando), I. Aizikowicz (Israelo), W. Proskurowski (Pollando), po 11 poentoj Sv. Ziegler (Danlando), L. Schödl (Germana demokratia resp.). Sekvontaj solvintoj gajnis malpli ol 10 poentoj — parte ankaŭ pro tio, ke ili ne partoprenis la konkurson ek de la komenco: Aŭstrujo: O. Kuttelwascher, Belgujo: Jean Oleffe, Ĉeĥoslovakio: T. H. Bohun, V. Hájek, M. Rybín, J. Řehoř, Ĉinujo: Zhu Shi Quan, Danlando: G. Jørgensen, Francujo: Gonin, D-ro Maillard, Chatelain, J. Plat, Talazac, D-ro Tortel, ŝak-klubo Bourg-la-Reine, Britujo: G. Shepherd, R. H. Thresher, Germana federacia respubliko: R. Dresel, L. Bechtold, H. Friess, E. Hölscher, Dr. Ziemann, Gvatemalo: H. Sanchez-Latour, Hispanujo: Fr. A. Thomasa, Nederlando: J. Hogenkamp, L. de Lang Evertsen, W. A. Verloren van Themaat, J. R. Janssen, Pollando: B. Babiak, J. Kryszinski, Bb. Osarczuk, f-ino Z. Czarnobaj, St. Lisawski, inĝ. E. Loth, ŝak-rondo Wrocław, Portugalujo: H. Ferreira da Silva, Sovet-Unio: M. Urban, f-ino V. Zlotnikova, G. Blumbergs, Usono: R. E. Holland, H. Wohl, L. A. Ware.

Inter 22 venkintojn ni lotumis 6 libropremiojn, kiujn donacis po 3 la redakcio de nia revuo kaj EŜLI. La lotumado favoris jenajn samideanojn: R. Iserentant, inĝ.

Jordanov, W. J. Maier, B. Fischer, E. Maynar, W. Meijns. Ni gratulas al la gajnintoj kaj ni sincere dankas al ĉiuj partoprenintoj de la konkurso 1961.

### NIA PROBLEMA KONKURSO 1962

Post sukceso de la unua konkurso ni malfermis novan probleman konkurson jam en la januara numero de nia revuo. Ni ĝojas, ke ni povas konstati, ke inter la solvintoj aperis jam kelkaj tute novaj nomoj. Sed ni opinias, ke inter abonantoj de nia revuo (aŭ inter iliaj amikoj) estas ankoraŭ multaj ŝakistoj, kiuj certe povus partopreni la konkurson. Tial ni invitas ĉiujn al partopreno. Ni ankaŭ rekomendas al la legantoj, ke ili montru la problemojn al siaj amikoj-ŝakistoj kaj instigu ilin partopreni. Vi tradukos al il unu, du leterojn kaj vi tiel gajnos novajn adeptojn por nia lingvo. Uzu la rubrikon por propagando de Esperanto inter ŝakistoj.


Por ebligi partoprenon en la konkurso 1962 ankaŭ al tiuj, kiuj sciigas pri ĝi nur nun, ni estas pretaj akcepti la solvojn de problemoj 1, 2, 3 ĝis fino de julio 1962. Pasintjare estis 75 partoprenintoj — ĉu ni atingos 100 en tiu ĉi jaro?

### ŜAKA KUNVENO EN KOPENHAGO

Post informo en la marta numero venis jam kelkaj aliĝoj al nia kunveno el 5 landoj. Ni esperas, ke vere ĉiuj esp. ŝakistoj informos nin ĝustatempe pri la partopreno, ĉar nur tiam ni povos fari la necesajn aranĝojn. Informon sendu al la gvidanto de nia rubriko ĝis la fino de junio. Plej malfrue en la dua triono de julio vi ricevos informojn pri la programo en Kopenhago.

### PROBLEMO N-RO 20 (konkurso 1962-n-ro 4)

G. Vetterd (GDR - Ŝachmaty v SSSR 1961 - IIIa prezo)



Mato en 3 movoj (pro ĝusta solvo 3 poentoj)

Kontrolo: Bl.: Rh4, De4, Tf5, Tg1, Kg6, Cf7, Ch7  
p.: d2, e6, f2, h5

Ni.: Rg8, Dal, Kd3, Cc2, p.: c3, c6, d6, e7

Solvojn sendu al gvidanto de Ŝaka rubriko, D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio ĝis 30.8.62.



Jam kiel infano de antaŭlerneja aĝo mi estis fama pro mia talento al poezio, kaj tiu talento baldaŭ akiris konkretajn formojn. Sed de kie ĉi tiu talento devenis? mi meditis ofte. Kiel konate, Parcoj pruveble ne ekzistas — kaj nur Dio scias, kiel staras la afero kun Apolo. Kiu scias, eble ankaŭ Apolo ne ekzistas: la homoj estas hodiaŭ jam tiom scivolemaj, ke ili trapenetas en la universon — kiel do ili jam de longe ne estu traesplorinta Olimpon?

Sed estu tiel aŭ aliel, la talento ĉi tie estis, kaj ĝi malkaŝiĝis jam en la unua klaso de popolernejo. Mi rememoras, kiel foje nia instruisto ludis al ni la kanteton "Tra la truo rampas kato" — kaj apenaŭ la tuta klaso ĥore finkantis ĉi tiun unuan version, mi enfalis kun mia solo "Langon montras al ĝi rato...". Nu, la instruisto ne montris tiam sufiĉan komprenemon por mia poezia talento — sed ĉu oni pro tio ĉesu? Ĉiu komenco ja estas malfacila....

Apenaŭ mia mano ellernis gvidi la plumon, mi eksentis bezonon skribi. Skribi! Mi kontentigadis mian bezonon sur nekalkuleblaj paperfoliaj, elŝiritaj el lernejoj kajeroj, kaj mi skribis, verkis. Mi versigis ĉion eblan (eĉ neeblan) — kaj ekzistis nenio, al kio mi ne estus dediĉinta almenaŭ unu poemon. La escepton faris sole

1. la samklasano Holeček, kiu precipe en la lasta tempo rifuzadis — kaj ĉiam pli arogante — doni al mi por kopii hejman taskon;
2. komunuma entrepreno, ĉar nia lifto ne funkciis (laŭdire jam ekde mia naskiĝo), kaj ni do devis grimpi tra la 118 ŝtupoj en la 5-an etaĝon piedire.

Al ĉi tiuj du estis mia favoro rifuzita pro kialoj pli supre indikitaj.

Jam antaŭlonge mi forlasis lernejajn benkojn; sur la mentono komencis al mi aperadi unuaj barberoj, kaj al mi ekŝajnis, ke mi povus miajn versojn publikigi. Por tiu celo mi verkis specialan poemon, kaj unutage mi kun batanta koro ekfrapis sur blankan pordon kun blua tabuleto "Ĉefredaktoro de la revuo Lacerto". Malantaŭ la pordo sidis pli maljuna, grizethara sinjoro. Li rigardaĉis en iajn paperojn, kaj min li eĉ ne atentis (la tusado ne helpis). Nur post longa tempo li ekrigardis al mi trans okulvitretoj, kaj kion mi al li laŭdire alportis.

"...ne ko... koleru, sinjoro re...redaktoro..."  
"Ĉefredaktoro".

"...sinjoro ĉef...ĉefredaktoro", mi balbutis,  
"ĉi tie... se vi...eble..."

Mi enmanigis al li mian verkon, atendante

lian verdikton. La ĉefredaktoro ekvidis la poemtitolon "La amo faras miraklojn", ekrigardis sur min, kvazaŭ dubante pri mia mensa sano. Poste li brue elpurigis al si la nazon, ekbruligis dikan cigaron, kaj denove enprofundiĝis en legadon. Kaj li legis pri tio, kiel ili — li kaj ŝi — renkontiĝis en parko sur benketo. Li estis mondumulo, sperta en aferoj de la koro — simple, vera kaj nefalsa Don Juano. Kaj ŝi? Bonmora knabino, ankoraŭ virgulino, scianta nenion pri malboneco de ĉi tiu mondo. Li volis konkeri ŝian koron, kiel jam multajn aliajn antaŭ ŝi: ĉar ŝi estis por li nur trofeo, nur ĉaskaptaĵo, kaj li — la ĉasisto. Sed, okazis miraklo: la amo forpelis lian malbonan intencon, kaj je unua fojo en la vivo trafis lian koron la sago de Amoro. La amo lin tute ŝanĝis: ĝis sia morto li restos al ŝi fidela, kaj forlasos ĉiujn siajn amatinojn.

"Nu, la poemo ne estas malbona, knabo", alparolis min la ĉefredaktoro. "Sed estas necese iom ĝin reverki. Ĉi tie ekzemple vi diras "ili renkontiĝis en parko sur benketo". Tio ne estas karakteriza por nunaj junaj homoj. En parko sur benketo naskiĝas nur hazardaj kaj mallongdaŭraj amoj — mi konas tion bone. Tiuj du devas renkontiĝi ie alie — ekzemple je ia manifestacio aŭ laborbrigado aŭ tiel simile. Plue: ŝi estas jam dekŝesjara — kaj ankoraŭ virgulino? Sensencaĵo, tiaj knabinoj ne ekzistas! Kaj kio estas la plej grava: vi priskribas lin kiel spertan mondumulon — kaj subite el la lupo fariĝas virŝafeto. Laŭdire li estos al ŝi fidela ĝis la morto — la amo faris tiun miraklon! Do: tio kun la fideleco ankaŭ ne estas karakteriza kaj versimila, tio unue, kaj due: oni diras, ke la amo faras miraklojn, sed tio ne estas vero. Tia tipo kiel li, tiu ne tiel facile forlasos sian intencon kaj rezignos; tian estas necese persiste konvinkadi kaj montri al li liajn erarojn kaj malbonon, kritiki lin, vipi. Do, tio estas proksimume ĉio. Iru kaj provu la poemon reverki, poste ni vidos".

Vere, ni vidis. Mi do ĉion reverkis, sed la ĉefredaktoro senĉese ne estis kontenta. Mi reverkis la poemon denove. Kaj denove. Kaj poste ankoraŭ okfoje, sed ĉio vana; kaj tiam traflugis al mi tra la kapo sava ideo, kaj mi prezentis la poemon al la ĉefredaktoro en origina teksto.

"Nu, rigardu, knabo", ĝojis la ĉefredaktoro, "nun vi verkis veran kaj publikindan poemon. Bonege! "Mi brilis pro feliĉo — mi trovis la vojon inter majstrojn de versado, kaj pri mia estonta viv-vojo estis tiel decidite.

Kaj poste mi verkis kaj verkis, publikigadis,



kaj atingadis ĝeneralan rekonon. Iom post iom mi fariĝadis konata. En influhavaj rondoj oni parolis pri mi kun estimo, la domposedanto ĉesis min admoni, ke mi pagu la ŝuldatan lupagon, kaj prerogative mi ricevis bileton je ĉiu internacia maĉo en hokeo. Sed senĉese mi sentis, ke mi ankoraŭ ne atingis la kulminon de miaj kapabloj, senĉese mi ankoraŭ serĉis, kio mankas al miaj poemoj.

Benita estu tiu tago, kiam mi aĉetis poezian almanakon, kaj benita estu la eldonisto! \*) Ĉar tiu tago signifis veran revolucion en mia ĝisnuna versfarado. Jes, ĉi tio estas la vojo — tio mankas al miaj poemoj! Estas necese skribi moderne, forĵeti la rimojn, kiuj estas nur superflua ŝarĝo! "Sensencaĵoj, idiotaĵoj!", diris unu mia konato post tralego de la almanako. "Mi komprenis preskaŭ nenion — ĉu tio do estas la moderna arto?" Ho, kia naivulo! Senĉese li estos ligita al la tero, neniam li ricevos flugilojn, sur kiuj li povus ekflugi al ĉielaj altoj de moderna poezio. Nu, diru mem — ĉu saĝa homo konfesas, ke li ne komprenas al tiu aŭ alia poemo, bildo, ktp? Ne, saĝa homo agas tute alie. Ankaŭ mi ne komprenis al multaj el tiuj poemoj, sed ne nur mi, la tuta legantaro: tamen, ĉu tiu fakto iun pravigas, ke li eldiru sian opinion tiel, kiel tiu mia konato? Kiel tute alie kaj saĝe agis alia mia konato Vopiĉka Alojzo, kiu analizis la poemojn ĝis la plej malgranda detalo, klarigadis ilin, donis al ili sencon, konatan sole al li kaj al la poeto, kaj kiu parolis pri kelkaj poetoj kiel pri siaj plej intimaj amikoj? Nu diru, kiu el ili agis pli saĝe? Ne estas ankaŭ malbone, havi ĉemane ian pikantan anekdoteton el vivo de tiu aŭ alia poeto: en la societo efikas tio tre bone.

Sed mi daŭrigu. Ankaŭ mi do komencis verki per ĉi tiu nova metodo. La sukceso estis surpriza. Kritiko superabundis per laŭdo (kio estas ĉe komencantaj aŭtoroj afero nekutima kaj verŝimile malpermesita), la konatoj salutis min jam de malproksime, la buboj min persekutis kaj flatpetis aŭtogramon. Redaktoroj interbatiĝis pri miaj poemoj. Oni akceptis min en la Ligon de la verkistoj, kaj dum unua kunsido mi estis unuvoĉe elektita ĝia prezidanto. Mi ricevis nekalkuleblan nombron da edziĝ-proponoj de virinoj 16- ĝis 60-jaraj.

Kaj kiam mi poste eldonis mian unuan poemaron, mi ekstaris firme kaj por eterne sur Parnaso, kie oni aljuĝis al mi honoran lokon. Ĉiu tiun poemaron mi dediĉis al motoristoj, kaj titolis ĝin "Mi aĉetos grizan aŭton". La poemoj ĉi tie estas jam tute modernaj, laŭ la ekzemplo de kelkaj "ankaŭpoetoj" — fine, prijuĝu la enkondukan poemon "La statistikoj avertas":

\*) *Kaŭzoj pure taktikaj ne permesas al mi, ke mi malkaŝu al vi la landon kaj la eldoniston, kie ĉi tiu almanako aperis. Sed eble mi ne kulpos, se mi perfidos, ke la almanako aperis en la j. 1959.*

En la pasinta semajno denove  
sur la ŝoseoj de nia regiono  
okazis  
dudek  
trafikakcidentoj.  
La kaŭzoj?  
Tro granda rapideco kaj  
nesciado de trafikreguloj kaj  
alkoholo.  
Ŝoforoj,  
veturadu prudente!  
Tre prudente!  
La statistikoj avertas!

(Al vi mi eble povas malkaŝi, ke la enkondukan poemon kaj kelkajn aliajn mi kopiis el gazeto: vi tion certe ne perfidos — la poemaro ja havis tian grandegan sukceson pro sia moderna koncepto!)

## ENKONDUKO DE ESPERANTO, NUN!

Antaŭ kelka tempo estis petata alsendado de adresoj de firmoj, oficejoj, butikoj kaj aliaj lokoj, kie Esperanto estas uzebla, por kompili adresliston. Post tio multaj personoj kunlaboris, sed la unua milo ankoraŭ ne tute estas plena; ni baldaŭ komencos la duan. Do sendu, sendu, sendu!

Grave estas, ke vi krom la nomon nepre aldonu la fakon de la entrepreno, aŭ la vendatan varon aŭ la faratan laboron aŭ la proponatan servon. Tio estas treege grava: sen ĝi la adreso **ne havas valoron**! Mi ankaŭ petegas vin ne uzi iun nacian lingvon por tiu detalo.

Ne necesas, ke vi uzu la specialan respondilon, kiu estas kunfaldita en ĉi tiu numero. Se vi tamen deziras pluajn, vi petu ilin de mi. Se vi ne uzas ilin, estu menciataj (mi insiste petas skribi preslitere):

1. La nomo de la entrepreno.
  2. Nepre la fako, varo, (se necese la kvanto: podetala aŭ po-granda komerco) k.t.p.
  3. La nomo de la persono, kiu scias Esperanton.
  4. La loko, kie li troviĝas en la entrepreno (eventuale kun telefonnumero)
  5. Se eble (por nia administrado) lia privata adreso.
  6. La nomo, adreso, eventuale la tel. n-ro de la menciato.
- Krom la lokoj, kie troviĝas esperanto-parolantoj, mi volas ankaŭ enlistigi la ejojn, kie estas esperanto-surskriboj pri la maniero de uzado (ekzemple preskaŭ ĉiuj publikaj telefonĉeloj en Nederlando) aŭ kie estas havebla faldfolio, katalogo, k.t.p. en Esperanto. Ili ja estas utilaj, speciale por la turistoj.

Estas la intenco ke la adresaro aperos en la dua parto de la jarlibro. Ankaŭ aparte ĝi estos havebla.

Nun mi direktas min al la

**DELEGITOJ!** La plimulto inter vi certe scias "Esperanto-lokojn" en via teritorio. Bone pensu kaj vi trovos plurajn! Vi prenis sur vin la belan taskon: helpi la Esperantistojn. Ĉi tiu adresaro signifos por ili tre gravan servon. Sed ne nur por ĉiu aparte, ankaŭ la tuta Esperantistaro profitos per ĝi. Al la ekstera mondo ĝi montros la gravegan utilon de Esperanto.

**SEKRETARIOJ** de la Esperanto-unuiĝoj kaj lokaj kluboj! Vi scias la adresojn de la membroj. Bonvolu esplori ĉies okupon por eventuale enlistigi ĝin. Se vi aparte konsideras ĉiun personon, vi miros pri la nombro de taŭgaj adresoj, kiun vi trovos. Cetere jam unu adreso estas grava! Pri traktu la aferon en la kunveno. Ĝi estu punkto de la tagordo.

**ESPERANTISTOJ!** Jen la okazo por mem enkonduki nian lingvon! **NUN!**

D-do J. Tensen, Churchillaan 100, Amsterdam-10, Nederlando, telefono: 79.54.06 (ĉe neressendo: 123123).



## LA KLIFOJ ĈE DOVER

(El „La Angla Piloto”) de Hendrik Wergeland (1808-1845)

### 2. APERO DE ANGLUJO.

”... Diru al mi, kapitano,  
kio tiel brile turas,  
kie lim’ ĉiela kuras  
kune kun la oceano?  
Ĉu la blanka dorso fore,  
de nubmonto, kiu falis  
sub la brov’ de l’ horizonto?  
Multaj ore  
pentris landojn, kiuj palis  
kvazaŭ la miraĝa fonto!  
— Ho, ne tiom blankas nuboj!  
Eble bloko  
de sunbrila glaci-roko,  
ekster dubo  
ŝtormpelita de l’poluso,  
drivas tie kun la fluso?  
Aŭ ĉu estas blanka spano  
ŝaŭmokresta de l’ ondaroj  
en moviĝ’ el novaj maroj,  
el Atlanta Oceano?  
Eble povus esti signoj  
de l’ arme’ de falsaj cignoj?  
Tiam en la horizonto  
certe do formiĝus fronto;  
je l’ unua avert-krio  
la taĉmento  
tuj disiĝus en nenio,  
kiel neĝ’ en kirla vento.  
Ĉu la monda limo-zono,  
lim-linio de la maro  
por eternaj vel-vojaĝoj,  
el arĝenta perlo-ŝtono,  
streĉas sin en tiu klaro?  
Ĉu ĉielaj or-palacoj,  
hela hejmo de Libero,  
lumas transe tra l’ aero?  
Aŭ ĉu l’ mar-dezerto estis  
sino por ĉielaj astroj?  
Ĉu samkiel lum-radioj  
el profundoj ili kreskis  
kaj reiris al la vastoj?  
Kiel gloro do por dio  
ilin sekvi en la bluo  
de l’ senfunda mond-vakuo;  
kiel en okul’ serena  
kiam penso,  
bona, bela kaj am-plena,  
brile breĉas tra la menso!”

### LA MARISTOJ

(Mel. : Angla ĉanto : “Have you been at Greenwich fair!”).

”Kio brilas  
tra la fum’  
inter nub’ kaj maraj rifoj,  
jen Anglujo  
en sunlum’,  
blankaj Dover-klifoj.  
De la Anglaj  
kverkoj jam

blovas freŝa vivo-spiro.  
Flaga lango  
sur la bram’  
flirtas en deliro.

Kentshire-kampoj  
en la vent’  
miksas dolĉajn flor-odorojn;  
al la lando  
ĝia tent’  
tiras marist-korojn!

Jen la baz’  
de l’ Angla ter’ :  
Konko-blanka kreta baro!  
Fortikaĵon  
la liber’  
trovis en la maro!

Cirkaŭ ĝia  
hejmo Di’  
faris fortajn bastionojn,  
ĝuste kie  
frontas ĝi  
la Eŭropajn tronojn.

Shakespeare-klifa \*)  
blanka spin’  
formas la marmoran ponton,  
kie mem  
la venk-reĝin’  
firme regas mondon.

Jen la klifo,  
brila mur’;  
nokto-nigra humo transas;  
verdaj kampoj  
— el velur’ —  
kvazaŭ ondoj dancas!

Kiel bona  
tia ter’  
devas por la kverko esti :  
ĝi nur virojn  
en liber’  
povas laŭre vesti!

Kiel bele  
por la vir’  
tie vivi, krei, loĝi!  
Kiel bone  
post elspir’  
sub la kverk’ ripozi!”

Tradukis Henry Friden

\*) La klifo, de kiu la blinda reĝo Lear en la tragedio de Shakespeare volis salti malsupren por trovi la morton.



# AŬTOROJ, AMATOROJ, DILETANTOJ KAJ BARBAROJ

Pri la tasko de Esperanto rilate literaturon estis jam multe dirite; bedaŭrinde la plejmulto en venton. Jes, malfacile refuti ĉiajn "sciencajn dubojn" pri la valoro de nia originala verkaro, kaj eĉ pri la lingvo mem, se post la dubantoj staras nigra potenco kaj supera diktatoreca volo subpremi ĉiun praktikan interkompreniĝon de popoloj. Se fine la Esperantistoj sukcesus tiukaze rebati ĉiujn atakojn, sekvos strikta malpermeso kaj persekutado. Tia scienca inventaro montris sin jam plurfoje en la historio de nia movado nehonesto ilo por subpremo al la penslibereco; dum similaj cirkonstancoj ĉia uzo de raciaj argumentoj estas minimume temperdo.

Sed eĉ forta malamiko, kiun oni tuj rekonas, estas danĝera malpli; pli abomenaj estas tiuj ŝajnaj amikoj, kiuj kun zorgoplena mieno trudas siajn dekretojn pri la kompetento de la lingvo. "*Esperanto, en sia esenco helpa lingvo, neniel bezonas ian ajn propran literaturon!*" "*Ni ne bezonas originalan poezion!*" Laŭ tiuj geniuloj de plej preferinda tasko de Esperanto estas la *traduko* de (elstaraj) nacilingvaj verkoj el diversaj jarcentoj... Nu, prespapero estas ege tolerema, sed ŝajnas ke la stulto en nia mondo ne havas limojn, ĉar tiam unuopuloj, absolute netalementaj volas dikti sian malfruigon al la ceteraj, kiuj havas talenton kaj prave sentas devon ĝin disvolvi. Ĉiu *artista* talento klare sentas kion la tempo postulas, kaj ne nur tion; talentulo ĉiam scias ĝuste taksi ankaŭ la estonton. Per tio oni ankaŭ povas lin distingi de diletanto, kiu estas nur imitema kaj efemera.

Foje oni ankaŭ — cetere tre malklare — provas argumenti per "amatoreco" de la Esperantaj verkistoj; ja vere oni preskaŭ neniam pagas en Esperantujo al la aŭtoro ian honorarion. Sed la amatoreco de si mem estas afero laŭdinda, se ĝin ne akompanas diletantismo. En la sportoj ekz. amato eĉ *nerajtas* ricevi pagon kaj tamen povas esti eminenta matadoro. Kia krimo do fare de niaj verkistoj....? Ni konsciu, ke se la Esp-istaro pli bone sentus siajn kulturdevojn, eĉ niaj verkistoj povus ĝui la antikvan devizon "Indas laboristo sian salajron..."! Sed oni ankoraŭ ne sentas la devon amase, kaj pro tio la verkistoj, ekagante en Esperanto, iĝas amatoroj. Kontraŭ tio povas helpi sole celkonscia kultur-propagando en niaj revuoj kaj rondetoj.

Barbarecan sintenon al la esp-a kulturo foj-

foje diktas ia ĝenerala neŝato, nekompreneo pri la arto; ofte montriĝas, ke la eksperto ne konas eĉ la plej eminentajn verkojn de sia propra nacia medio. Ni ne malkuraĝu diri, ke ĝi estas certa-grada mensmalsano fanfaroni pri ignoremo. "Mi ne komprenas la muzikon!" oni povas aŭdi el la buŝo de klerulo kun tia triumfa aplombo, ke oni sentas honton pro tia povra "klereco"; mi aŭdis tiel paroli eĉ homon kun akademio titolo. Sed limitaj duonkleruloj kun aplombo kuraĝas kritiki artverkojn plej ofte el dogmaj pozicioj. Kontraŭ tio ili prete kuŝas sur la ventroj pro ĉiu efemero, se ĝi nur prenas *sciencan* mantelon. Ne estas multaj parvenuoj meze de l'Esperantista movado, sed el la periferio ili povas de temp-al-tempo alŝoviĝi. Tiuj estas aĉaj malamikoj internaj.

ESTAS PLI MULTE DA ARTISMA SPIRITO EN ESPERANTO OL ONI UNUAVIDE SUPOZUS; tiun spiriton enblovis en la lingvon ĝia kreinto tuj de la komenco. Prave la geamikoj titolis lin *Majstro*. Kaj d-ro Zamenhof konscie disvolvis mem ĝuste tiun artisman aspekton de la Lingvo Internacia. Sekvi lian vojon estas nia *devo*! Neniu lingvo povas daŭre resti akcesora, kaj simila klarigo de la nocio "help-lingvo" estas eĉ stulteta. Ĉar samkiel ekz. la muziko estis origine ligita al movo, danco, kaj post ĝia maturiĝo apartiĝis, tiel ankaŭ aliaj aferoj inklina esti memstaraj. En Esperanto la kreado de originala literaturo estas "natura" sekvo de ĝia spirito, nepre artisma.

Ni evitu kompari la lingvon al iu "mekanika konstruo", sed ankaŭ ĝi ne estas "vivanta organismo"; lingvo nek estas maŝino, nek vivanta estaĵo. La homa lingvo estiĝis multe pli frue ol ĉiaj mekanikaj iloj, lingvo estas karakteriza propraĵo de la tera homo; ĉiu lingvo krom tio estas unika de sia speco, kaj ne ĉiam oni povas kun plena sukceso traduki specialan aspekton de koncerna medio en aliajn lingvojn. Pri tio urĝas atentigi niajn traduk-amegantojn: *ne ĉio taŭgas esti tradukota*, kaj ne ĉio havas ion por diri al la internacia publiko, eĉ se ĝi estas nekontestebla valoro nacilingva!

Ĉiu pensulo rajtas elekti libere la lingvon por esprimi siajn pensojn; kiun li elektos dependas de la ideoj kiujn li amas, kaj de orbito de liaj intereso. Kaj estas memkompreneble, ke oni havante ideojn, pensojn, rilatojn, tutmondajn kaj



sentojn humanismajn, facile venas al Esperanto. Elektro de alia lingvo ol la nacia aŭ krom la nacia neniel estas perfido de sia nacieco: oni tamen ne povas flugi el la haŭto. Anglo, franco, germano, ruso oni ne ĉesas esti uzante alian lingvon; restas baza tono kaj gravaj trajtoj de la denaska nacieco por ĉiam. Sed oni povas fariĝi aĉa loka patrioto, ŝovinisto aŭ egoisto tiam, kiam oni ekmalŝatas la ĝeneralajn internaciajn konvenciojn kaj humanismajn ideojn; tiun aspekton de moralo konscias ĉiu bona Esperantisto.

Kulturi sole ian abstraktan "ilon" de la internacia interkompreniĝo — estas por Esperantisto

## NIA FORUMO

### PRI ESPERANTA MORSKODO

La raporto de L-to Mc Mullen estas bona, ĉar ĝi montras la gravecon de tiu problemo.

Jam diversaj projektoj estas verkitaj; antaŭ kelkaj monatoj, mi mem faris proponon pri tio, kaj mi ricevis respondojn, sugestojn kaj rimarkojn de profesiaj radiistoj, radioamatoroj, k.t.p. Ankaŭ trafan raporton sendis al mi S-ro D. RICHARDSON, W7LLV. La opinioj estas treege diversaj.

"La organizaĵoj ne oficialigas kodon ĝis ĝi estas provita sed la uzantoj ne provas ĝin ĝis estas oficialigita", skribis al mi humure L-to Mc Mullen.

Do, estas necese, ke ni interkonsentu, antaŭ ol proponi kodon al oficialaj instancoj. Laŭ mi, ne estus malfacile akordiĝi rapide pri ĝi.

Por Ĉ, mi proponas — . — . . : Tiu signo estas internacie konata kaj uzata en la turka, portugala kaj brazila kodoj, malofte en la franca (ç). (La turka ç estas kiel ĉ).

Por Ĝ, mi proponis — — — . , sed — — . — . proponita de L-to Mc Muller, ŝajnas al mi taŭga. Tiu signo estas iam uzita de kelkaj italaj Radiostacioj, kiel G', antaŭ kaj dum la dua mondmilito.

Por Ĥ, mi proponis — . . — : X en la internacia kodo. Laŭ mi, la uzado de tiu signo por X kaj Ĥ ne estus malfacilaĵo. Ĉu radiisto, scipovanta Esperanton, skribus, ekz: xaoso, exo por ĥaoso, eĥo, li tre bone komprenus. Cetere la litero Ĥ estas tre malofta kaj kelkfoje anstataŭigata per K. Eble estus preferinde uzi alian signon. Kelkaj el miaj korespondantoj proponis al mi: — — . . — = Mi ne havas preferon.

Por Ĵ, mi proponis — . — — : internacie konata kiel Y. Oni proponis al mi pli taŭgan signon: . — — — . aŭ — . — — . =

Por Ŝ, la plej bona signo ŝajnas — — — : internacie konata kaj uzata en la kodoj rusa, bulgara III (š), turka s (š), greka X (š malmola), araba (š), kaj malofte en la franca kaj itala ch.

Por ŭ, . . — — : internacie uzata por ŭ estas bonega.

Kompreneble estus ĉiam permesata

uzi ch, gh, k.t.p. (eĉ: c/, g/ aŭ c' g', k.t.p.) por anstataŭigi supersignajn literojn.

Ankaŭ mi proponis la mallongigon vs (V kaj S ligitaj) . . . — . . . : Esperantlingve. Per Esp. Morskodo. C Q V S : al ĉiuj Esp. Radioamatoroj.

Kion vi opinias pri tio?

73 kaj samideanan saluton. (74...?!)

H. Y. Chaisnot - F 9 E D

### NEŬTRALECO

Antaŭ mi kuŝas la kajero de "Esperanto" n-ro 676(3), kie mi trovis interesan artikolon "Neŭtraleco", kiun mi plurfoje tralegis. La artikolo estas bonege verkita, ĝustatempa, kaj ĝi povus esti la fundamenta ideologia bazo de tutmonda Esperanto-movado, se ĝi ne enhavus unu grandan eraron.

S-ro Smith skribas: "Aliaj pekoj kontraŭ neŭtraleco estas... **dekreto** kontraŭ la atombombo, ktp". Li do opinias, ke estas peko, se UEA aŭ iuj aliaj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj levus sian voĉon kontraŭ la minaco atombomba? Mi bone komprenas, ke niaj oficialaj organizaĵoj devas esti neŭtralaj, severe neŭtralaj, rilate al la religioj, politikaj konvinkoj, rasoj kaj kredoj, ĉar ĉiu homo rajtas esti tia, kia li mem deziras, se liaj agoj ne minacas al la Homaro. Sed ni ne povas esti neŭtralaj al la doktrinoj propagandantaj kaj celantaj hombuĉadon — al la minaco atombomba.

Por kio ni bezonos Esperanton, se iun tagon, laŭ la krima volo de iu ajn frenezulo, ekflamos en la mondo pereiga atombomba milito? Tiam regos nur unusola internacia "lingvo" — la lingvo de atomhidrogenbombaj eksplodoj!

Petro Poliŝĉuk

### AVANGARDO

El la kaŭzoj, kiuj malhelpas la prosperon de la Esperanto-movado, ne la plej lasta estas la indiferenteco kaj neglektemo de la Esperantistaro mem.

Hontinda fakto estas ekzemple, ke ni ne plenumas eĉ la plej fundamentajn, eĉ la plej memkompreneblajn taskojn, kiujn la prudento kaj logiko postulas.

Ni estas adeptoj de internacia lingvo. Nia celo estas, ke ĝin kiel eble plej multaj parolu, tamen ankaŭ ni mem ne parolas ĝin! Eĉ dum kunsidoj

tre malmulte; konscie rekoni la grandan destinion de nia planedo estas unuaranga tasko por ĉiu homo sen diferenco nacia. Ĝi estas progreso: scii, ke la historia tasko de nia Tero estas amo. Kaj tiu ama sento devas radii en la tutan kosman spacon. Sed unue ĝi devas esti portata inter la homoj de diversaj nacioj kaj konscie kulturata; tial ankaŭ devas eĉ Esperanto havi propran literaturon, poezion, jes eĉ verkojn sciencajn en ĝusta senco. Kaj plejprefere devas havi pasian amon al la evoluo kaj progreso ĉiu unuopa Esperantisto, por ke li povu ĝin disporti.

Stefo

ni prefere uzas nacian lingvon. (UK. festparolado de dr. Lapenna!).

Kiel do ni imagas ellerni lingvon, kiun ni ne parolas?

Kiel ni imagas disvastigi lingvon, kiun ni mem ne uzas?

Do se ni volas tamen vivi kaj prosperi, tiam ni devas nin turni al la kelkaj aktivuloj, kiuj tamen troviĝas preskaŭ en ĉiu grupo, kaj iamaniere kunigi ilin al deviga agado. Nome la plej multaj homoj bezonas ion, kio ligas kaj devigas ilin por ŝanĝi ilian bonvolan, sed laŭkaprican agadon al konstanta, sistema laboro. Nur tiamaniere ni povas eviti la per "bonvolo" pavimitan koridoron, kiu kondukas al loko, kie oni nur gapante atendas la rostitan kolombon. Tiucele ŝajnas esti taŭga, krei batal-kaj laborgrupon "AVANGARDO", kies membrojn nenio kunligas krom la sama solena promeso, laŭ kiu ĉiu honorvoĉe devigas sin por plenumi kelkajn taskojn, kiujn cetere ĉiu konscienca Esperantisto devus ankaŭ sen promeso plenumi.

La "AVANGARDO" ne solvas ĉiujn malfacilaĵojn, tamen signifas gravan paŝon antaŭen, se la aktivuloj komprenos ĝian signifon, kaj amase aliĝos.

Pli detala informo estas ricevebla kontraŭ unu, aliĝilo kontraŭ du respondkuponoj.

Esperanto-Propagando, Lund

### ESPERANTO SERCGAZETO

Post la ĉiutaga, peniga laboro, post la seriozaj legaĵoj, ĉiu volonte legas ion facilan, ion, kion ne postsekvas meditado, ion, kio igas nin rideti per sia spriteco, aŭ eble per sia stulteco.

Esperantujo ne havas ŝercgazeton, do se fervora entreprenemulo kreus tian gazeton, li nepre pretigus surprizan agrablaĵon al la Esperanta popolo. Ĉiu akceptus kun ĝojo! Ne nur kiel novaĵon, kiel pliriĉigon de niaj legaĵoj, sed ankaŭ pro ĝia perfekta, facile komprenebla lingvaĵo varia temaro, akompananta plaĉajn kaj spritajn karikaturojn.

Konsiderante ĝian unikecon, — sen konkureco, — ankaŭ la negocaj ŝancoj ŝajnas esti favoraj.

Ek!

Esperanto-Propagando, Lund.



# PRI MORI OOGAI, JAPANA VERKISTO

Miyamoto M.

**MORI** Rintarô, plumnome **MORI** Oogai, naskiĝis antaŭ cent jaroj, 1862, kiel la unua filo de kuracisto servanta al la daimio de Tuwano en la provinco Iwami (nun Gubernio Simane). La daimio, kiu poste fariĝis ĉe la tennoa (aŭ en malpli konvena formo prenita en Plena Vortaro: mikada) registaro estro de Religiaj Aferoj, estis konata ŝintoisto, kaj la tuta feŭdo estis fama pro la rojalismo al la tennoo; mi pensas, ke tia tendenco ne malmulte kontribuis por la formiĝo de la verkisto.

En 1804 post la studo de medicino en Imperia Universitato en Tokio li iris al Germanujo, sendita de Japana Armeo, al kiu li ekservis kiel kuracisto, kaj studis tie en universitatoj en Lejpcigo, Munkeno kaj Berlino; eble noti ne estus seninterese ke li studis en la lasta universitato sub la gvido de Roberto Koch, fama mikrobĉasanto. Oni devas noti, ke tiama Germanujo aŭ Prusujo estis la plej aspirata modelo de juna Japanujo, kiu deziris sin formi laŭ tiu modelo kiel absolutisman ŝtaton, kaj ke tiu lando estis rigardata kiel la tipo de eŭropaj landoj, kie la ekzakta scienco plej disfloris. Do, estas sufiĉe supozeble, ke lia pliposta konciza stilo bazita sur la stoika samurajismo estis multe rafinita kaj hardita. Post la reveno en 1888 li laboris en la medicina kampo de la armeo ĝis li atingis la plej superajn postenojn: kuracisto-ĉefinspektisto aŭ estro de la kuracburoo en la armeo. Post la ekŝiĝo li havis postenon: estro de Tennoa Muzeo aŭ tiu de Imperia Belarta Muzeo.

En 1889 li komencis sian beletristan karieron per la eldono de 'La Portretoj' (traduka poemaro, kun aliaj aŭtoroj) kaj per la fondo de la revuo 'Sigaramizôsi' (Kajero Gabio), kiu daŭris aperi ĝis 1894, kaj peris eŭropan kulturon al la juna japana socio; kaj li aperigis novelojn kun romantika aromo 'Dancistino', 'Pri Efemereco' (1890) kaj 'La Mesaĝo Komisiata' (1891), kaj samtempe sur la bazo de la estetiko de K. R. E. Hartmann komencis polemiki kontraŭ **TUBOUTI** Syôyô (1859-1935) pri la idealo en la beletro. Baldaŭ ekaperis sur tiu revuo kaj ties heredanto 'Mezamasigusa' (Kajero por Veko, 1896-1902) lia traduko el H. C. Andersen 'Improvizistoj' (1892-1901). Ĝi donis nesondeble grandan influon al la japana socio kaj vekis grandan sensacion, kvankam ni nun povas diri, sur la nuna kriterio, ke ĝi jam ne estas traduko el literaturo por junuloj, sed lia originala romano saturita de romantika ekzotismo.

Ce la eksplodo de Japan-Rusa Milito li iris al Manĉurio kiel la kuracisto-inspektisto de la dua korpuso, kiu sieĝis Port-Arturon sub la komando de Generalo **NOGI**, kaj de la fronto li sendis diversformajn poemojn al la familio aŭ al amikoj, kiujn oni poste kompilis kaj titolis 'Taglibro el Poemoj' (1907).

Post la milito li fondis sian salonon por utao, en kiu partoprenis utaistoj el novaj kaj malnovaj skoloj, kaj... **YAMAGATA** Aritomo (1838-1922) la plej granda politikisto de la absolutismo. Baldaŭ instigita de la leviĝo de la naturalismo en nia lando kaj de la vigla laboro de **NATUME** Sôseki (1877-1916) li komencis sian senlakan kreadon, kiu povis finiĝi nur per lia morto kun kelktempa intermito. Noveloj kaj romanoj 'Vita Sexualis' (1909, malpermesita de la registaro pro 'obscena' priskribo), 'Junulo' (1910-1911), 'Kasuistika', 'Revo' (1911), 'Sovaĝansero' (1911-1913) kaj dramo 'Rivero Ikutagawa' (1910) estas tiamaj produktaĵoj. Ankaŭ lia traduko el W. von Goethe 'Faŭsto' aperis en tiu tempo (1913). La sufero de la epoko, en kiu feŭdismo, kapitalismo kaj ties antagonisto socialismo nove leviĝanta baraktis kaj luktis inter si, ankaŭ lin kaptis, sed kontraŭe al la pli posta generacio, kies ekzemplon vi jam vidis ĉe **AKUTA-**

**GAWA** Ryûnosuke (1892-1927) kun la libro 'La Kapao kaj aliaj' (tradukita de **NOZIMA** Yasutarô, eldonita de Japana Esperanto-Instituto, 1954), li disponis la aferon siamaniere: li celis raciigi la absolutisman potencon laŭ la postulo de la politiko, aŭ eĉ volis utiligi la socialismon por la bono de la regantaro, nome meti sur la vojon de nacisocialismo. Tiu ĉi tendenco estas klare videbla en lia verko 'Jen Kiel' (1912) aŭ en pli poste aperigita lia eseo 'El Malnova Kajero' (1912, nefinita), kvankam aliflanke ni vidas okulfrape tra la tuta lia verkaro alian tendencan: eskapi el la realo kaj sin distri nur en la mondo de la beletro.

La jaro 1912 estis grava por li kaj eble ankaŭ por la historio de la japana literaturo ĝenerale. Mortis Tennoo Meizi (1852-1912) kaj lin mortakompanis Generalo **NOGI** kun sia edzino, al kiuj li estis intima. La samurajismo ankoraŭ vivas! ŝokita de la evento li tuj verkis noveleton 'La Testamento de **OKITU** Yagoemon' en kiu li laŭdis aŭ eĉ himnis la mortakompanion de la heroo, certe tro arkaikan moralon instruantan ne domaĝi la vivon por la bono de la mastro. Estus ne seninterese observi kiel aliaj verkistoj frontis al la fakto: la jam menciita granda verkisto **NATUME** Sôseki, kiel li, laŭdis la generalon, dum **AKUTAGAWA** primokis la sintenon de la akompanantoj, kiuj antaŭ sia morto lasis foti sin, aŭ **MUSYAKÔZI** Saneatu (1885- ), alia liberalista verkisto, klare esprimis sian naŭzon kontraŭ ili. Ankaŭ li tamen ne povis resti tute trankvila longatempe nur en tiu vidpunkto, ĉar li, edukita de la samurajismo mem, plej bone konsciis ke tiu moralo ne ĉiam sin bazas sur tia simpla fideleco. Tuj sekvis 'La Familianoj de **ABE**' kaj 'SABASE Zingorô' aŭ 'La Venĝo sur Kampo Goziingahara' (1913); aperis sinsekve de lia plumo noveloj kun historia temo 'Oosio Hiehatirô', 'Afero en Sakai', 'Sinjorino **YASUI**' (1914), 'Sansyô-dayû' (1915) aŭ 'La Lastaj Vortoj' (1916), kiuj reflektas la belon de la vivo, en kiu liaj herooj travivis plej intense kaj obstine nur por sia kredo, sed ne ĉiam por la blinda rojalismo. Baldaŭ tion anstataŭis alia pli moderna spirito — la suspektemo, spegulata en noveloj 'Takase-barko' kaj 'Kanŝan kaj Jite' (1916). Tiu suspektemo tuj ŝanĝiĝis rezignacio tipe orienta, certe kaŭzita de lia malgraŭvola ekŝiĝo el la armeo, kaj de tiam liaj herooj fariĝis nefamaj personoj, plej ofte konfuceanoj, kiuj vivis en angulo de la feŭdisma socio: '**SIBUE** Tyûsai' (1916), '**IZAWA** Ranken' (1916-1917), '**HÔZYÔ** Katei' (1917-1922, nefinita, aperigita parte post lia morto) kaj aliaj apartenas al ties kategorio.

Tamen ni devas kalkuli lian meriton ne nur en la originala, sed multe pli en la traduka laboro; liaj tradukoj ampleksas kun lia enciklopedia eruditeco kaj senkompara poligloteco krom Goethe kaj Andersen, jam menciitaj, Ibsen, Hofmann, Daudet, Schnitzler, Hauptmann, Wilde, Poe, Flaubert, Rilke, Shakespeare, D'Anunzio kaj aliaj verkistoj, preskaŭ senfina vico da verkoj; ili ĉiuj pioniris por nia literaturo.

Krome, ankaŭ estas notinde, ke lia aktivado daŭris ne nur sur la beletra kampo, sed ankaŭ sur la medicina, lia propra: li disertis multajn en lingvoj japana kaj germana. Mi nur bedaŭras ke mi restas plenplena laiko en tiu kampo kaj ne povas tie menci iajn laborojn.

Jes, mi tre multe menciis pri lia neŝatata flanko: ideologo de la japana absolutismo. Tamen mi pensas ke lia merito sur la japana literaturo neniom bagateliĝos pro tiu tendenco. Ĉu bone aŭ malbone, la oriento vivanta en lia verkaro ankoraŭ vivas kaj nestas profunde en nia idearo. Oni nur pensu, ke tia samurajismo vivas kaj pulsas eĉ en radikalaj kristanoj, kiuj protestis kontraŭ la milito, aŭ en plej konsekvencaj komunistoj, kiuj eltenis sin en karceroj tra 18 jaroj.

Jen kial mi senhezite prenis lin, kiam Tibor Sekelj rekomendis kaj konsilis al mi partopreni la grandan laboron por la reciproka aprezo de orientaj kaj okcidentaj kulturoj, kvankam mi reŝtas unu el la plej konsekvencaj kontraŭmilitistoj.



'Rakontoj de Oogai' kompilita de mi aperos, laŭ mia espero, almenaŭ ĝis la frua somero, de Japano Esperanto-Instituto kaj sub la aŭspicioj de Universala Esperanto Asocio kiel la Oriento-Okcidento Serio 2, kun jena enhavo: 'Takase-barko' (trad. T. MIKAMI), 'Sansyô-dayû' (MIYAMOTO M.) 'La Mesaĝo Komisiata' (K. MATUBA) kaj 'La Familianoj de ABE' (NOZIMA Y.)

## LA PORINSTRUISTA RONDO DE „GRAJNOJ EN VENTO” STARTIS!

Normalaj lernejoj — seminarioj — porinstruistaj lernejoj, *internacie* kunligu vian Esperanto-klubon de estontaj geïnstruistoj! Tiu gravega tasko, la verkado de propra internacia gazeto, estas *la unua ŝtupo*, de kiu iom post iom eliros plej diversaj kulturigaj interŝanĝoj, *ĝis reciproka invito kaj gastigado de gestudentoj alilandaj*.

La junaj kaj subtenindaj gestudentoj el porinstruista lernejo Ljubljana pravas, kiam en la antaŭparola paĝo de la ĵus eldonita kajero ili skribas:

KARAJ GESAMIDEANOJ!

*KIO ESTAS GRAJNOJ EN VENTO?* La kajero, kiun tri foje en la jaro preparas 3, 5, aŭ 8, aŭ... lernejoj kune. Ĝi parolas pri la lernejo, pri la lernantoj, ilia laboro kaj distro, iliaj problemoj, pri la loko kie ili vivas, k.tp. ĉion ĉi skribas kaj desegnas la gelernantoj mem.

*PORINSTRUISTA RONDO.* Ĉu vi ne kredas, ke la gejunuloj, kiuj lernas por fariĝi instruistoj kaj kiuj krome konas ESPERANTON, dezirus scii, kion faras same tiaj gejunuloj en PARIZO, LONDONO, VARSOVIO, BEOGRADO, SAN FRANCISKO, TOKIO, MONTEVIDEO? Ni kredas ke jes, kaj ESPERANTO-GRUPO en PORINSTRUISTA lernejo en LJUBLJANA akceptis la proponon de s-ro M. Erbetta, funkcii kiel centro de nova rondo de "GEV", kiu kunligu la ESPERANTO-GRUPOJN en porinstruistaj lernejoj en diversaj landoj. Per tiu ĉi kajero, la Centro de Porinstruista rondo prezentas sin.

*Por la komenco ni proponas jenon: sendu al nia adreso ĝis la fino de oktobro 1962 1 (unu) paĝon de internacia formato A4, sur kiu vi indiku: nomon kaj adreson de la lernejo, aĝon de la gelernantoj kaj la daŭron de la lerno (en JUGOSLAVIO ekz.: de 6 sept. ĝis 20. junio). Sur saman paĝon surgluu la bildon (poŝtkarton) de via urbo, sub kiu sekvu la subskriboj de ĉiuj esperantistoj en tiu porinstruista lernejo. La paĝon faru en 20 ekzempleroj kaj ĉion sendu al:*

ESPERANTO — GRUPO UČITELJIŠČE, Resljeva c. 12, LJUBLJANA — JUGOSLAVIO ĝis la 31a de oktobro 1962

Gejunuloj estontaj instruistoj, profesoroj! konsciigu pri tiu via tasko: *internacie* kunligu viajn fortojn! Per tio vi konsiderinde helpas al la venko de la internacia lingvo!

## GEOGRAFIA SEMAJNO

*Dua komuniko pri Geografia Semajno en Oden-se, Danio, 28/7—4/8 1962. — 3p. kun informoj kaj aliĝilo pri tiu ĉi populartema semajno, malferma por ĉiuj kun intereso pri ĝeneralaj, geografi-rilataj aferoj. Prelegantoj el 6 landoj prezentos temojn pri Ĉinio, Dana etbienula movado, Bulgario, Afriko, Fungo-narkotiko, Esperanto en geografia instruado, Popola arto kaj muziko en Jugoslavio, Finnlando ktp.*

Okazos interesaj ekskursoj, distraj vesperoj kun demanda forumo, parolata geografia revuo, filmoj, diapozitivaj kaj sonbendoj. Oni loĝos en tipe dana popol-altlernejo, kies geestroj estas esperantistoj. Ĉe la lernejo estas modela bieneto kun stalo kaj maŝinhalo.

La prezo estas 175 d. kr. — Prospekto kaj aliĝilo estas havebla ĉe la organizantoj: *Roma kaj Poul Thorsen, Dyblandsvangen 7, Kopenhago, Brh.* Se eble kontraŭ respondkuponon.

## LA JARLIBRO DE U.E.A.

Ĉar nia movado evidente nutras sin ĉefe per la kotizoj kaj abonoj de siaj membroj, necesas serĉi rimedon por igi ke la ekstera mondo enkasigu al ni, por ŝpari al ni la poŝojn. Tial al la mondo ni devas ion vendi. Kion ni havas por vendi? Ĉu varojn? Apenaŭ: nur kelkajn librojn kun aparta intereso. Ĉu servojn? Jes, ja! Unu gravan servon ni ja disponas: nome, reklamadon. Per nia jarlibro ni povas reklami tra vasta kampo.

Tial ni varbu por ĝi kiel eble plej multe da reklamantoj. Ĉiu el ni konas en sia hejmurbo entreprenon kiu eksportas, kaj tial bezonas reklamojn en fremda tereno. Eble lokaj hoteloj volas allogi en siajn pordojn vizitantojn el eksterlando. Se ili estas proksimaj, vizitu ilin: kunportu kun vi la donitajn respondojn al iliaj kredoblaj demandoj: montru al ili la jarlibron: indiku al ili similajn reklamojn al la bezonataj, el iu por ili fremda lando.

Se la koncerna entrepreno situas iom distance, sendu poŝte al la koncerna entrepreno mendilon, kun via ekzemplero de la jarlibro, afrankitan resendkoverton jam adresitan al vi, kaj atendu rezultojn!

Reklami en la jarlibro kostas 80 guldenojn por tuta paĝo, kaj proporcie por duon- kaj kvaron-paĝo. La teksto kaj pago devus atingi la Centran Oficejon de U.E.A. en Rotterdam antaŭ 15a de Novembro por la unua parto, kaj antaŭ 15a de Aŭgusto por la dua parto. La disvendkvanto de la dua parto estas tiel granda, kiel tiu de la unua parto.

Se vi volas ke bildo aŭ desegnaĵo aperu en la reklamo, necesos sendi aŭ kliŝon aŭ kopion el kiu oni povos fari kliŝon en Rotterdam. Se vi ne sendos, kaj oni devas fari kliŝon, necesos aldona pago laŭ modera tarifo. Se vi sendos kliŝon, vi povos avizi ĝin sur la etiketo kiel "Specimeno senvalora", kiam la dogano kredeble ne impostos ĝin.

H. Fillingham

## RICEVITAJ LIBROJ

Senzi Yamaguti: LA BELAN PACON. El la japana trad. Ter. Isiguro. Eld. Jaŭda Rondo, Tokio, 3a eld. 1962. 31p. 18.3 × 13 cm. Prezo: us. dol. 0,30. (Unu ekz. ricevita).

SENNACIECA REVUO, N-ro 90. Eld. S.A.T., Parizo, 1962. 56 p. 22 × 17 cm. Prezo: 2,20 gld. (9 steloj). (Unu ekz. ricevita).



# VIRINOJ LEVAS SIAJN VOĈOJN POR PACO

William Auld

La konservado de la paco estas la granda problemo, kiu frontas al ĉiuj raciaj homoj sendepende de apartaj politikaj, religiaj aŭ aliaj kredoj kaj konvinkiĝoj. Kaj eble ne estas neneŭtrale konstati, ke la starigo de daŭra kaj ekvilibra paco en la mondo estos ebla nur ekster la limoj de tiu aŭ alia kredo aŭ konvinkiĝo, t.e. per la sincera kaj bonvola kunlaborado de homoj el ĉiuj landoj kaj koloroj politikaj kaj haŭtaj; sen tia kunlaborado, se ni realisme rigardas la mondon, rezultigos ne paco sed milito — milito tiel senespera kaj sensenca kiel la religiaj militoj de la deksepa jarcento en Eŭropo, sed milionoble pli detrua.

Ke tia pozitiva kunlaborado inter la plej diversopiniaj homoj estas ne ĥimero sed reala ebleco, pri tio ni havas nerefuteblan pruvon ĝuste en nia propra neŭtrala movado, en kiu la homoj sukcese kunlaboras por komuna celo malgraŭ ekstermovadaj konvinkiĝoj ofte rekte kontraŭaj. Kiel oni povas kunlabori por Esperanto, tiel alia movado povas kunlabori por la paco, se ĝiaj membroj akceptas reciprokan toleremon por atingi la celon.

Tia movado, religie, politike kaj nacie neŭtrala, estas "Voĉo de Virinoj", starigita de kanadaj virinoj kun la celo "atingi mondpacon per internacia amikeco kaj komunikado". Evidente tia movado baldaŭ karambolas kun la lingva diverseco de la homaro, kaj pro tio la estraro de VdV favoras Esperanton kaj starigis ankaŭ fakon de korespondado en Esperanto. Multaj kanadaninoj lernas la lingvon por kontakti kun virinoj en la tuta mondo. La adreso de tiu fako estas: 'Voĉoj de Virinoj', Esperanta fako, P.O. Box 344, Oakville, Ontario, Kanado, kaj la esperantistinoj estas kore invitataj kontakti kun siaj kanadaj fratinoj pere de tiu fako.

Okaze de la 46a Universala Kongreso la organizaĵo eldonis libreton\* kiu klarigas ĝiajn celojn kaj sintenon. Interalie la organizaĵo transdonis al la ĉefministro de Kanado rezoluciaron, kiu klarigas la dezirojn de la membroj. Unu el la ĉefaj rezolucioj koncernas la starigon de Pacesploraj Institutoj en diversaj landoj.

## La Ponto de Racio — Pacesploraj Institutoj

Kanada inĝeniero kaj fizikisto Norman Z. Alcock rezignis pri sia tre sukcesa kariero en 1959 por dediĉi sin al studado pri la problemoj de paco kaj la problemoj kunligitaj kun la starigo de daŭra paco. Konstatinte interalie, ke la usona senato

rifuzis dediĉi 0,4 milionojn da dolaroj por studoj pri senarmigo, kvankam 0,4 milionoj estas nur unu milono de unu elcento de la jara defenda buĝeto, li alvokas por starigo de Pacesploraj Institutoj en diversaj landoj, kie sciencistoj studu la demandojn ligitajn al tiaj problemoj, kiaj senarmigo, malutileco de milito al ĉiu ajn, k.s. Li proponas, ke la institutoj laboru nacilingve, sed uzu Esperanton por informi kaj komuniki inter si.

Tiun proponon subtenas la 'Voĉo de Virinoj', kaj baldaŭ komenciĝos monokolektado por starigo de du tiaj institutoj, unu en Kanado kaj alia en alia lando, laŭeble en orienta Eŭropo.

## Porpaca Petskribo de Britaj Virinoj

Kvankam la britaj virinoj ankoraŭ ne estas tiel bone organizitaj por paca laboro, tamen ankaŭ en Britujo la virinoj deziras pacon, kaj tiurilate ni ricevis jenan mallongan raporton de Marjorie Boulton:

Antaŭ nelonge, grupo de britaj virinoj, ne el unu politika partio aŭ eklezio, sed privataj personoj kiuj agis simple kiel vivokreaĵ, vivgardemaj virinoj, proponis al la virinoj de Britujo petskribon. La respondo estis grandskala kaj kortuŝa. La malgranda komitato transdonis la petskribon al la ĉefministro de Britujo kaj portis kopiojn al la londonaj ambasadejoj de Usono, Francujo kaj Sovet-Unio. Modestaj estis la vortoj; tiuj simplaj virinoj ne pretendis proponi solvojn al la problemoj, kiuj malkvietigas la mondon; sed ili petis ankaŭ de ŝtatestroj tiun modestecon, kiu taŭgas al ŝtatestroj. La petskribo tekstis tiel:

"Ni, la subskribintaj virinoj, voĉdonrajtaj en Britujo, timigite per la minaco al niaj familioj kaj al la tuta homaro, minaco kiun enhavas la internacia situacio laŭ sia elvolviĝado en la lastaj kelkaj monatoj, petegas al la registaroj de la Grandaj Potencoj, ke, dum tempo ankoraŭ restas, ili rekonsideru siajn sintenojn kaj urĝe ekklopodu por realigi:

- (a) traktaton pri haltigo de la provado de nukleaj armiloj;  
tujan rekomencon de interkonsiliĝado kiu kondukos al la malmultigado kaj finfine la plena forigado de nukleaj armiloj, kaj la malmultigado de konvenciaj armiloj;
- (c) novan prikonsideradon, fare de ĉiu registaro, pri sia sinteno pri tiuj ĉi punktoj kaj aliaj pridisputataj aferoj, tiel ke ili rezignu ĉiujn kriteriojn de nuraj fiero kaj prestiĝo, por provi atingi solvojn interkonsentitajn.

Tiujn ĉi farojn ni petas, pro viroj, virinoj kaj infanoj tra la tuta mondo. Ni petas, ke oni faru nun".

**VOĈOJ DE PACO.** Eld. Voĉo de Virinoj, Toronto, Kanado, 1961. 40 p. 16 × 12 cm. Prezo: 3 steloj, sed unuopaj ekzempleroj estas senkoste sendataj al eksterlandaj petintoj.



## Nova literuma alfabeto MIOPEGA DECIDO

Ek de la 1a de Majo 1961 validas la "Radio-Regularo" kaj la "Aldona Radio-Regularo" pri Telekomunikado (Genevo 1959).

Krom ŝanĝojn pri send- kaj ricevfrekvencoj kaj aliajn tarifojn la Nova Radio-Regularo preskribas novan internacian literalfabeton.

Kaj ĝuste tiu nova alfabeto estas ege bedaŭrinda afero. Antaŭe oni uzis internacian alfabeton kiu konsistas grandparte el geografiaj nomoj. Ĉar tiuj nomoj malofte kaj apenaŭ ŝanĝiĝas en la diversaj naciaj lingvoj (ankaŭ parole) kaj ĉar neblas konfuzi tiujn vortojn kun la ordinara parollingvo, tial tiu alfabeto bone taŭgas kiel internacia literuma alfabeto. Tial ĝi ankaŭ adaptiĝis en Esperanto kaj estas ekz. reale uzata de la membro-maristoj de Marrondo en la intershiptrafiko. Sed la nuna nova alfabeto estas grandega regreso, ĉar ĝi estas tute ne internacia. Ĝi estas origine la usona literuma alfabeto, poste uzata de aviadistoj kaj pli poste adaptita de NATO. Kaj nun oni bombardis tiun abocon (aŭ aboaĉon) internacia! Krome ĝi el politika vidpunkto ne ŝajnas al mi tre neŭtrala! Ĉu la socialismaj landoj emos uzi NATO-alfabeton sur usonangla bazo? La alfabeto konsistas el la plej diversaj ordinaraĵ tekstvortoj kaj scio de la usona (angla) prononcado estas absolute necesa. Krome oni povas en angla teksto konfuzi kelkajn literumajn vortojn kun ordinara parolata teksto. Laste montriĝas, ke ĉe multa interferenco kaj atmosferaĵ perturboj aŭ malforta ricevado la novaj vortoj estas apenaŭ kompreneblaj, dum la malnovaj estas almenaŭ ĉiam sufiĉe klaraj pro sia karaktero (littersinsekvo). Komparu por tio la provojn de longdistanctelefonado en diversaj lingvoj per kiu montriĝis ke la angla estas plej malbone aŭdebla kaj Esperanto plej klare aŭdebla.

Kiun ajn titolon meritas tiu alfabeto, certe ne la titolon "internacia"! Ofte en trafiko inter ŝipoj kaj bordstacioj oni povas konstati erarojn en la literumado kaj tre ofte la telefonisto de tia stacio mem petas transiri al la malnova alfabeto. Multaj radiotelefonistoj sur ŝipoj simple ne akceptas la novan alfabeton kaj uzadas ankoraŭ la malnovan vere internacian alfabeton. La kaŭzo de multaj mankoj de tiu nova aboco verŝajne troviĝas en la fakto ke ĝi estas komplilita de iu militisto kaj ne de iu kiu scias ion pri filologio. La opinio de la plejparto de la maristoj estas positive malfavora al la nova alfabeto. Kial oni elektis ĝin? Mi ne scias, sed verŝajne nur pro politika obstino. Estas tre bedaŭrinde ke kiam oni bezonis novan abocon, oni ne kontaktis kun la Esp. movado.

Esperanto ja montriĝis esti plej klare komprenebla tra la (radio-)telefono.


Kompare jen la alfabetoj:

| Esperanto   | Malnova int. | Nova int.            |
|-------------|--------------|----------------------|
| Amsterdamo  | Amsterdam    | Alfa                 |
| Brazilo     | Baltimore    | Bravo                |
| Centrimetro | Casablanca   | Charlie (ĉali)       |
| ĉokolado    |              |                      |
| Danlando    | Danemark     | Delta                |
| Esperanto   | Edison       | Echo (eko)           |
| Flrido      | Florida      | Foxtrot              |
| Germanio    | Gallipolo    | Golf                 |
| ĝenovo      |              |                      |
| Habano      | Havana       | Hotel                |
| ĥaoso       |              |                      |
| Italio      | Italia       | India                |
| Jeruzalemo  | Jeruzalem    | Juliett (dzju-li-et) |
| jaŭdo       |              |                      |
| Kilogramo   | Kilogram     | Kilo                 |
| Londono     | Liverpool    | Lima                 |
| Madagaskaro | Madagascar   | Mike (majk)          |
| Novjorko    | New-York     | November             |
| Oslo        | Oslo         | Oscar                |

|           |            |                    |
|-----------|------------|--------------------|
| Parizo    | Paris      | Papa               |
| Quebec    | Quebec     | Quebec             |
| Romo      | Roma       | Romeo              |
| Santiago  | Santiago   | Sierra (si-era)    |
| ŝanhajo   |            |                    |
| Tripoli   | Tripoli    | Tango              |
| Usono     | Upsala     | Uniform (juniform) |
| Varsovio  | Valencia   | Victor             |
| Washinton | Washington | Whiskey            |
| Xantipe   | Xantippe   | X-ray (iks-rej)    |
| Upsilono  | Yokohama   | Yankee (jen-ki)    |
| Zamenhof  | Zürich     | Zulu (dzulu)       |

K. Ruig  
ĉefnavigisto,  
profesia radiotelefonisto

## KRUCVORTENIGMO



(R) = vorto sen finaĵo.

**HORIZONTALA:** 1) rezultas ĉe E-aj kaj aliaj kongresoj, renkontoj, kunvenoj; 10) negativa; 11) gaso de nia atmosfero (R); 12) ne pli ol; 13) ligna kuvego; 15) ŝovi la langon sur io (R); 17) malgranda (R); 18) instrumento; 20) ekstera buŝrando (R); 22) mallongigo de monata Egazeto aperanta en Hago; 24) skrapi kampon (R); 26) fluaĵo de arterioj kaj vejnoj (R); 28) antaŭe, kelkfoje, 30) brulegi, flami (R); 32) rapidegi, urĝegi (R); 33) atentinda (R); 35) iakaŭze; 37) artikolo; 38) erare, fuŝe, maltrafe (R); 40) modelo, ŝablono, karakterizaĵo (R); 42) plurala personpronomo; 44) filo de filo (R); 46) nenormala inklinego al io (R); 48) muzika sono (R); 50) objekta korelativo; 52) pli ol sufiĉe, 53) altrangaj diplomataj reprezentantoj.

**VERTIKALA:** 1) de naturo saĝa, sagaca, sprita; 2) malaprobi; 3) prepari felon en ledon; 4) egipta sundio; 5) subtera ĉambro (R); 6) aŭdperceptilo (R); 7) estaĵo de idonaska sekso (R); 8) plezurege, agrablege; 9) skribregulaĵoj, 14) grasa fluaĵo (R); 16) perlipa amesprimo (R); 19) el valorega metalo, 21) taŭge ennvolti varon por porti aŭ ekspedi (R); 23) duo (R); 25) tema prepozicio, 27) literocifero (R); 29) elstara parto de virina brusto (R); 31) preciza tago (R); 34) "forta" trinkaĵo (R); 36) fino, ĉeso (R); 39) organikaj karakterizaĵoj distingantaj viron de virino (R); 41) familia kapo (R); 43) parte, ne tute, 45) tre obeema al religiaj postuloj (R); 47) konvencia mallongigo por numero; 49) komencliteroj de luksa E-revuo; 51) lirika poem (R).

Ivica SPONAR, Zagrebo





# LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :  
Heinrich Reiter, Van der Nüllgasse 100/10/15  
Wien X, Aŭstrujo.

## LA III-a TUTLANDA BALO DE BULGARA ESPERANTISTA JUNULARO EN RUSE

Mil sescent junaj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto venis en Ruse, la 7-an de aprilo por la balo-renkonto de la bulgara esperantista junularo - nekredible, sed fakto !

"La urbo de nia ĉi-jara renkontiĝo junulara estas unu el la pordoj de nia patrolando; pordo tra kiu ĉiutage trafikas al kaj el eksterlando - homoj, varoj, leteroj kaj per ili sentoj de amikeco, porpaca sopiro kaj internacia kunlaboremo.

Aliflanke, ni troviĝas antaŭ eventoj gravegaj por nia enlanda esperantista movado : la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio dum 1963 kaj la 19-a IJK de TEJO" — diris interalie en sia festparolo la Prezidanto de la Junularo Sekcio de BEA inĝ. S. Simeonov, skizante la plej aktualajn taskojn de la esperantista junularo en la lando.

"Nun la problemoj estas kompletigi la akiritajn nekontesteblajn sukcesojn rilate al kvanto kun rapida atingo de lingva perfekteco. Nun la celo estas la kvalito".

La junulara balo okazis en la larĝaj ejoj de la Urbodomo. Ĉarma bubo kaj lia fratino-pioniro direktis en versoj siajn salutojn al la partoprenantoj. Salutis la ĉeestantojn ankaŭ la Sekretario de BEA — V. Oljanov, reprezentanto de la Urba Komitato de la Komsomolo kaj sveda esperantisto s-ro Axelsson, dumtempe troviĝanta en Ruse. Oni legis multajn saluttelegramojn kaj leterojn venintajn el eksterlando, inter kiuj telegramo de la Ĝenerala Sekretario de TEJO.

La junulara balo pulsas sub la muziko de tri orkestroj ĝis frua mateno.

La sekvontan tagon estis organizita la tradicia Oratora konkurso, kiun partoprenis sep gejunuloj, precipe novaj esperantistoj. Nekontestebla venkinto denove estis A. Ĉalâkov el Burgas.

La posttagmezo estis dediĉita al ekskurso ĝis la Ponto de la amikeco, tre bone organizita per aŭtobusoj kaj kiun favoris krome la varmeta printempa suno. La giganta ŝtala ponto, kunliganta Ruse kun la rumana urbo Giurgiu havas du etaĝojn, unu por la aŭtomobila ŝoseo kaj alia por la fer-

vojo kaj estas unu el la plej grandaj pontoj en Eŭropo. La impona konstruaĵo neniam pli frue havis tiom multe da esperantistoj sur "sia dorso".

La dutaga renkontiĝo estis oficiale fermita sur la herbejo de la urba parko, kie en angulo, nomita "Aleo Esperanto" estis plantitaj ses kaŝtanoj — daŭra memorigo por la vere agrablaj printempaj tagoj, kiujn la esperantista junularo pasigis en Ruse.

Vespere la pasaĝeroj de la internacia vagonaro Moskvo-Sofio kun scivolemo observadis unu bruan junulan grupon kiu skandis sur la kajo : "Vivu Esperanto !", "Esperanto ! Paco !" ... Jes, la esperantistaj grupoj unu post la alia forlasas Ruse kaj oni eluzas la okazon ankoraŭ iom publike propagandi.

### POLUJO

La junaj gvidantoj de la 4a kunveno de la Pola Esperanto-Junularo sendis nome de la preskaŭ 400 gepartoprenantoj salutkarton al vi, esperantista junularo en tutmondo. La bone sukcesinta kunveno okazis de la 30.III ĝis 1.IV en Bytom. Ĉeestis ankaŭ geamikoj el kvin aliaj landoj.

### GEFIANĈIGIS

— niaj geamikoj John Gbourne (Wolverhampton) kaj f-ino Audrey Lloyd (Wednesfield), Britujo. Ni kore gratulas !

### PAROLAS LA LEGANTO

"Bonvolu sendi al mi kaj al mia fianĉino detalojn pri la venonta skiferio kune kun aliĝiloj. Mi antaŭĝojas, reveni post kvar jaroj kaj atendas plezuregan ferion en Aŭstrujo".

John Gbourne, Britujo

Karaj geamikoj,  
supozante, ke la printempo ankaŭ vin logas el domo kaj inspiras al vi vojaĝemon, ni anoncas al vi, ke

GERMANA ESPERANTO-JUNULARO okazigos sian 7-an Internacian Junular-Kunvenon ĉi-jara en Oberkirch kaj sur Sohlberg en la Nigra Arbaro de la 9-a ĝis la 16-a de junio 1962.

La 7-a IJK estu precipe ferio-

semajno en la bela Nigra Arbaro en sud-okcidenta Germanujo. Do okazos pluraj ekskursoj tra la rava montaro.

Krome ni aranĝos diskut-grupojn pri diversaj aktualaj temoj el politika kaj kultura vivoj. Amuzaj vesperoj ja estas memkompreneblaj !

Dum la pentekostaj tagoj la gejunuloj partoprenos la programon de la jubilea 40-a Germana Esperanto-Kongreso kaj i.a. ekskursos autobuse al Strasbourg.

De la 9-a ĝis 12-a de junio ni estos en komuna loĝejo por gejunuloj kaj poste loĝos en la bele situanta junulargastejo sur Sohlberg apud Oberkirch.

Kotizoj estas tre malaltaj pro denova subvencio de la Federacia Registaro. Kotizo, kovrante ĉiujn tranoktojn, manĝaĵojn kaj aranĝojn de la 7-a IJK, estas por :

junul(in)o malpli ol 25-jaraĝa GM 56,00  
pliagulo GM 70,00

Gejunuloj malpli ol 25-jaraĝaj ricevos repagon de parto el siaj vojaĝelspezoj sur la linioj de la Germana Federacia Fervojo, t.e. kutime 50% !

Aliĝu laŭeble baldaŭ, komunikante viajn precizajn nomojn, adreson, aĝon, sekson kaj profesion. Detalojn pri alveturo, loĝado kaj programo vi ricevos post enveno de via aliĝilo.

Ĝis revido aŭ interkonatiĝo vin salutas kore kaj amike via

Germana Esperanto-Junularo  
Trude Düsterhaus,  
509 Leverkusen 5  
Schubertstrasse 27

En la marta numero de la revuo "Esperanto" mi legis vian raporteton pri la 7-a internacia skiferio en Filzmoos.

22 gejunuloj vere ne estas granda nombro por internacia skiferio. Sed mi kredas, ke grava kaŭzo de ne pli granda partoprennombro estas la tro malfrua publikigo de tiu ĉi aranĝo. En la "Germana-Esperanto-Revuo" ekzemple aperis la anonco nur en la decembra numero, kiun mi nur ricevis meze de la monato. Alie mi ankaŭ volonte estus partopreninta.

Mi proponas, pli frue publikigi la venontajn skiferiojn, por ke la interesuloj sufiĉe frue povu prepari sin."

Horst Schickschneit  
Hamburg

### REDAKCIAJ

### KUNLABORANTOJ!

Pro viaj sendaĵoj mi tre kore dankas. Certe vi rimarkas, ke nia paĝo pli kaj pli aktualiĝas. Mi tre urĝe petas vin, bonvolu sendi denove raportetojn kaj artikolojn (kun foto), sed ne forgesu sendi po 2 ekzemplerojn (se eble eĉ tri). Vi ŝparas per tio multan tempon kaj laboron al mi.

Kun amika saluto : Via redaktoro



# Tra la Mondo

## Argentino

● **Klubo en Venado Tuerto** havas propran sidejon. La 10an de marto okazis la inaŭguro de la propra sidejo de nia klubo en Venado Tuerto (strato Sarmiento n-ro 387). Je la oka vespere la urbestro, s-ro José V. Cibelli (Honora Membro de la klubo kaj de Argentina Esperanto-Ligo) simbole malfermis la pordon de la domo. Sekvis festo kun paroladoj de reprezentantoj de la diversaj enlandaj asocioj. La postan tagon oni pritraktis en la klubo la fondadon de Argentina Esperanto-Kooperativo. Multaj samideanoj jam subskribis kaj pagis akciojn.

● **Ĉe Argentina Ĉambro de Deputitoj** estas proponata la deviga instruado de Esperanto en la Lernejoj. La 2-an de aprilo la argentina deputito S-ro Luis Mendez prezentis al la Ĉambro de Deputitoj de la Provinco de Santa Fe, la proponon ke oni starigu laŭleĝe la devigan instruadon de la lingvo Esperanto en ĉiuj lernejoj, unuagrada kaj duagrada, de tiu provinco. Santa Fe laŭ graveco estas la dua provinco en Argentino, historie ĝi estis scenejo de gravaj eventoj precipe rilate al konstitucia organizo, kaj pro ĝiaj naturaj produktaĵoj tre riĉa. Sed Santa Fe ankaŭ kulture estas tre aktiva kaj tial estas bona grundo por la Esperanto-movado. Jam en tiu provinco ekzistas du urboj, kiuj ricevas regulan subvencion de la lokaj estraroj. Tri stratoj havas la nomon Esperanto aŭ ties aŭtoro, kaj en la pasinta jaro la Ministerio de Edukado helpis per granda monsumo Esperanto-societon por aĉeti de propra domo. Oficiale Esperanto estas instruata ĉe Fakultato de Filozofio kaj Beletro kaj neoficiale ĉe Fakultato de Juro kaj Instruista lernejo. De antaŭ tri jaroj, en la 15-a de septembro, en ĉiuj elementaj lernejoj devige la instruistoj devas prelegi al la infanoj pri Esperanto. En Rosario, la plej grava urbo de tiu provinco, naskiĝis la landa Esperanto-organizaĵo Argentina Esperanto-Ligo aliĝinta al UEA. Facile oni konstatas ke en Santa Fe regas etoso favora al nia Afero kaj la nuna propono de la deputito S-ro Luis Mendez tion asertas. La esperantistaro de la tuta lando aktive agas por elvoki ĉe la kulturaj societoj kaj la popolo, moralan apogon. Multnombraj leteroj de tiuj societoj subtenantaj tiun proponon jam estas senditaj al la prezidanto de la Deputita Ĉambro celante impresi ties membrojn kaj ilin instigante por la aprobo de tiu leĝa projekto. Laŭ la konstitucio de tiu provinco, nesufiĉas ke leĝo estu nur aprobatata de unu ĉambro de reprezentantoj sed estas necese ke ankaŭ la Ĉambro de Senatoroj havigu al ĝi ankaŭ sian aprobon. Tial ni alvokas ĉiujn internaciajn,

landajn kaj lokajn Esperanto-societojn, kaj ankaŭ unuopajn esperantistojn, por ke amase ili sendu apogantajn leterojn aŭ poŝtkartojn je nomo kaj adreso indikitaj jene: Señor Diputado Luis Mendez, Cámara de Diputados de la Prov. de Santa Fe, Cámara de Diputados, Ciudad de Santa Fe, Argentina. Se ni ĉiuj atingas elmontrajn fortojn, la sukceso estos nepre, ĝin ni celu kaj dume akceptu la koran dankon de la argentinaj esperantistoj.

## Aŭstrujo

● **Esperanto rekonita kaj honorigita** flanke de la **Federacia Prezidanto de Aŭstrujo**. La 13an de aprilo okazis en la aŭdiencsalonego de la Ministerio por Edukado en Vien, en ĉeesto de Ministeria Konsilisto D-ro Veits, Min. Kons. D-ro Reisenberger, Sekcia Kons. D-ro Otruba, Sekcia Kons. D-ro Brunner, Ĝeneraldirektor-anstataŭanto de Nationalbibliothek Kortega Kons. D-ro Kissner, Ĝeneralsekretario de Federaciaj Fervojoj Kortega Kons. D-ro Sandig kaj de parencoj, kunlaborantoj en la Muzeo kaj amikoj de Kortega Konsil. Hugo Steiner la transdonis de la al Hugo Steiner flanke de la Federacia Prezidanto dekretita Aŭstria Honorkruco por Sciencoj kaj Artoj. La Ministro por Edukado, D-ro Heinz Drimmel, ĉeestis konferencon ekster Vien, kaj lin anstataŭis Sekcia Ĉefo de la Ministerio D-ro Franz Hoyer, kiu en sia longa alparolado menciis la gravan laboron de la distingito dum jardekoj por Esperanto, la fondon de IEMW, kaj lian al Aŭstrujo faritan laboron per Esperanto.

## Belgujo

● **Rimarkinda jubileo**. La 25an de majo gesinjoroj Jan Jacobs-Bertha Van Der Stegen el Antwerpen (Belgujo), respektive 77 kaj 75 jaraj, rememoris la 50an datrevenon de sia geedziĝo. Sinjoro Jakobs eklernis Esperanton en 1907 kaj lia edzino en 1909. Ili partoprenas ankoraŭ nun aktive en la movado. S-ro Jacobs estas eksprofesoro pri lingvoj. Li estas prezidanto de "Antwerpena Esperanto-Propaganda Komitato". Dum la IXa U.K. en Bern (1913) li kreis la rolon de "Modredo" en ia lirika dramo "Ginevra" de D-ro Privat. Li ludas gravan rolon en la loka kaj internacia movado por bestprotektado.

## Brazilo

● **La gazeto "O Comércio"** en sia numero de la 4a de aprilo aperigis la artikolon "Esperanto en la danaj lernejoj" de D-ro Ivo Lapenna, kiu aperis en la novembra numero de "Esperanto". La portugalan tradukon faris s-ro Armindo Trarbach, Prezidanto de la Esp. Societo de Cachoeira do Sul, kaj loke del. de UEA.

## Britujo

● **En Strathkinness, Fife**, okazis je Pasko la 16a Studrondo de la Fife Esperantistoj. Ĝi nun havas tre inte-

resan interrilataton kun grupo en Pódebrady, Ĉeĥoslovakio, kiu ĉiun someron partoprenas somerlernejon. La skotaj Esperantistoj sendis artikolojn al Pódebrady, kaj ricevis responde artikolojn el Ĉeĥoslovakio.

## Finnlando

● **La 18an de marto la urba radio en Pietarsaari** prezentis 15-minutan esperantlingvan dissendon. La estro de la Laborista Instituto intervjuis instruistinon Olga Ihander kaj lernantinojn E. Kaistinen kaj S. Laine. S-ino Laine deklamis parton el Kalevala, kaj oni trivoĉe kantis arion de Schubert. Ĉe la Kristnaskfestoj de la Laborista Instituto de Pietarsaari la esperanta grupo partoprenis la programon en sia propra lingvo, per deklamado kaj kantado. La gazeto "Keski-Pohjalainen" daŭrigas sian serion de artikoloj tradukitaj el "Esperanto" de f-ino Olga Ihander.

## Francujo

● **La konata poŝformata kolekto "Que sais-je?"** publikigis libron pri la internaciaj lingvoj. La aŭtoro P. Burney bone klarigis la nunan Babelismon kaj dediĉis 12 paĝojn al esperanto (ref.nro 968, prezo 2,50 NF).

● **En Lille, tri nederlandanoj** ĉeestis kunvenon de la NordFranca Federacio kaj instigis al partopreno al la unua markola kongreso en Bulonjo-apud-mar. Laŭreatoj de la konkurso: Ligot, L. Bourgois, G. Preux, J. Dietrich.

● **La revuo de la usona kultura centro** dediĉis "forumon" al sugestoj de legantoj pri esperanto.

● **En Wattrelos** (Norda Francujo), esperantistoj kunlaboros kun la komitato por internaciaj interŝanĝoj, kies unua celo estas amika akcepto de eksterlandanoj.

● **Regiona renkontiĝo** okazos en Amiens, verŝajne dum oktobro. Informo: F-ino Mauchien, 10 Rue de Noyon, Amiens (Somme).

● **La japana televido** prezentos dokumentojn pri Francujo kaj pri la eŭropa vojaĝo de Prof. Taro Nišiumi, el Tokio.

● **En teknika liceo (Ecole nationale professionnelle) en Limoges**, esperanta kurso ĵus komenciĝis: 64 junuloj (14-21 jaraj) deziras jam korespondi kun samaĝuloj antaŭ la somerferioj kaj interŝanĝi p.k., p.m., b.k., filatelajn afrankojn, alumet-etikedojn, ktp. Bonvolu gratuli la lernejestron kaj sendi korespond-petojn al la kursgvidanto: s-ro Trémon, E.N.P., Limoges, Francujo.

## Grekujo

● **Publikan paroladon en Esperanto** pri Bavario, kun projekciado de koloraj bildoj, faris germana samideano Ludwig Thalmaier dum kelktaga vizito al Grekujo, Okazis paralela tradukado greklingven.

## Hispanujo

● **XXIII-a Hispana Kongreso de Esperanto**. Ĝi okazos en la historia, arta



kaj ĉarma urbo Valladolid — je la centro de la lando — de la 25-a ĝis la 28-a julio. La provizora programo ellaborita per la agema LKK enhavas interesajn erojn. La eksterlandaj esperantistoj estos kore bonvenaj kaj ili helpas sukcesigi la kongreson, ĉar ilia partoprenado praktike montros al la multaj gelernantoj de la loka Grupo FIDO KAJ ESPERO ke Esperanto estas praktika afero.

● **Zamenhof-strato en Zaragoza.** Laŭ decido de la urba konsilantaro de Zaragoza, nova strato nun konstruata ricevis la nomon: "Strato de la D-ro Zamenhof, aŭtoro de la Internacia Lingvo Esperanto". Por sukcesi en ĉi tiu afero devis ne malmulte labori la lokaj asocioj "Fraterco" kaj "K.E.H.A."

● **1-a Hispana Esperanta Junulara Renkontiĝo.** La Junulara Sekcio de la Hispana esperanta Federacio (HEJS) organizis tre sukcese 1-an HEJ-Renkontiĝon la 27-an de majo. Okazis la festo en la ejo de la Esperanta grupo "Sabadellense" de Sabadell (Barcelono). Partoprenis pli-malpli 80 gejunuloj de diversaj provincoj. La programo plaĉis al la ĉeestintoj, precipe la prelego pri Mallorca, kun kiu la Ĉefdelegito S-ro R. Molera prezentis 50 belajn kolorajn diapozitivojn.

● **La koincida celo de Esperanto-Movado kaj Unesko** intimigas la rilatojn inter ambaŭ. Tial la Barcelona Klubo de "Amikoj de la Unesko", fondita antaŭ unu jaro, altiris multajn samideanojn, kaj la ĝenerala medio en tiu Klubo estas tute favora al nia internacia lingvo. Do, bone perspektivas organizado de prelegoj, ekspozicioj kaj kursoj de kaj pri nia lingvo en la Barcelona Klubo de "Amikoj de la Unesko", kiu verŝajne baldaŭ disponos propran sidejon tre ampleksan.

Se en aliaj urboj ekzistas tiaj kluboj kun esperantistoj, oni povus en nia lingvo interrilati, kunlabori, evidentigi ke Esperanto estas utila por la celo de Unesko inter ĝiaj kluboj. Sendu viajn proponojn, sugestojn aŭ nur salutojn al la provizora adreso de "Amikoj de la Unesko", Rda. Universidad 21-2º E, Barcelona (7), Hispanujo.

● **Unua oficiala Internacia Tendumejo apud Bilbao.** Ekde la 15a de junio proksima ekfunkcios, apud la strando "La Arena" en la vilaĝo Somorrostro, je 17 km. de la provinca ĉefurbo Bilbao, internacia tendumejo. Ĝia oficiala inaŭguro tamen okazos nur dum primtempo 1963, kiam ĝi estos ankoraŭ plibonigita kaj pliampleksigita. Tiu-ĉi kampadejo estas lokigata je 150 m. de la Kantabra marbordo kaj tuj apud la ŝoseo. Nun ĝi havas amplekson nur por 35 tendoj, sed nuntempe oni aranĝas la terenon por pliampleksigi la areon tiamaniere ke ĝi povu enhavi ĝis 150 tendojn. Ĉiu tendo disponas je spaco de 100m² kun propra areo por parki

veturilojn. Nune la areo ampleksas nur 3.500 m² sed oni povas pliampleksigi ĝin ĝis 15.000 m² kun speciala zono por parki aŭtomobilojn. La prezoj por restado, por eksterlandanoj, estas jenaj: 10,- pesetoj por persono tage kaj ankoraŭ 12,- pesetoj por ĉiu aŭtomobilo aŭ veturilo ĉiutage. La tendumejo funkcios, kiel dirite, ekde la 15a de junio nunjara ĝis la 15a de septembro. Oni povos havi, inter aliaj akcesoraj instalaĵoj, administrada oficejo, nutraĵvendejo, trinkejo kaj higienaj servoj. Interese por ĉiuj tendumemaj geesperantistoj estas scii ke, krom la malmultekosteco de la prezoj, ili povas facile interrilati kun hispanaj gesamideanoj, ĉar je 18 km. t.e. en Bilbao, ekzistas vigla Esperanto-Klubo kun ĉ. 190 gemembroj. La Grupejo situas en malnova kvartalo de Bilbao, str. Barrencale Barrena núm. 7-2º-dekstre, telefono 24-44-92, kie la gesamideanoj kunvenas ĉiutage, ekcepte la dimanĉojn aŭ festotagojn, ekde la 19a h. ĝis la 22a h. vespere. La adreso por interrilati kun la ĉefoj de l' priskribita tendumejo estas: "Club Internacional de Camping". — str. La Paz núm. 5.- Bilbao —, sed gesamideanoj povas ankaŭ peti informojn de la Bilbao Esperanto-Grupo aŭ rekte de la subskribinto. L. de Otaola. - Bilbao - str. Iturribide, 78-2º-d- (Represo ne nur permesata, sed varme deziregata k. rekomendata).

#### Kanado

● **Aperis anglalingva informnumero de "Kanada Esperanta-Revuo".** Sur 44 paĝoj troviĝas artikoloj pri diversaj aspektoj de nia lingvo kaj movado, tute ĝisdataj kaj bele ilustritaj. Ĝi estas eble la plej trafa anglalingva varbilo en ekzisto. Ekzemplerojn oni povas ricevi de KEA Book Service, 34 Martin Road, Toronto 7, Ontario, Kanado. Prezo: dol. 0.35 (10 ekz.: dol. 2.75; 100 ekz.: dol. 20).

#### Nederlando

● **Denaska esperantisto el Middelburg,** Bennie Weber, 13-jara, gajnis eŭropan konkurson. Lia desegno estis premiita kiel la plej bona inter 50.000 kontribuadoj!

● **15-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia en 1962.** La ĉi jara internacia kongreso de K.E.L.I. okazos en Strandbaden, Svedujo, de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto, t.e. en la semajno antaŭ la U.K. en Kopenhago. Tuj antaŭ la K.E.L.I. kongreso okazos unusemajna esperanta kurso por gejunuloj en la sama loko. Pro tio ankaŭ nia kongreso havos junulecan karakteron. La ĉeftemo estos: "Al kiu apartenas la estonteco?" Krome okazos bibliaj studoj, distraj kunvenoj, filmprezentadoj kaj ekskursoj. La kotizoj por partopreno de la kongreso, kun restado, manĝado, tranoktado kaj unu tuttaga ekskurso varias (depende de la ĉambroj) inter 100 kaj 150 svedaj

kronoj. Informojn donos al vi: F-ino Tini Putto, Bennekomseweg 20, Ede (Gld.), Nederlando.

#### Portugalujo

● **Grava alvoko al ĉiuj medicinistoj.** La X Internacia Kongreso de Pediatrio okazos ĉi-jare en Lisbono (Portugalio), de la 9-a ĝis la 15-a de Septembro, kaj ĝin devas partopreni ĉirkaŭ 3.000 sciencistoj kaj kuracistoj. Mi estas enskribita por prezenti sciencon komunikadon. Tiu kunveno estas tre grava oportuneco por elpruvi la praktikan valoron de esperanto en la internaciaj sciencaj rilatoj (en la antaŭa Kongreso, en Montreal, estis utiligita Interlingua kiel libervola resuma lingvo). Tial mi alvokas ĉiujn esperantistajn kolegojn, kiuj intencas ĉeesti la Lisbonan Kongreson, kontakti kun mi, kiel eble plej rapide, kun la celo konsideri la eblecon realigi specialan kunvenon kaj vizitojn al Medicinaj Institucioj. (Oni petas la represon de tiu-ĉi alvoko en la naciaj E.-gazetoj). D-ro A. César Anjo. Fakdelegito (Medicino-Pediatrio) de U.E.A. Reprezentanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio, Rua Alexandre Lobo, 72-3º -Viseu (Portugalio).

#### Sovetunio

● **Moskvo.** Fine de Januaro k/j. estis dum la kunsido de Esperanta Sekcio ĉe Centra kulturdomo de Medicinistoj ellaborita vasta rezolucio de ĝenerala kunveno de la Sekcio, kie estis notitaj ĉefaj gravaj momentoj de la granda laboro, farita dum la pasinta jaro, kaj tuŝitaj multaj aktualaj problemoj de Esperanta movado kaj de Esperantaj organizaĵoj en Sovetunio. Samtempe en la rezolucio de la Sekcio estis pentrita per helaj koloroj la programo por nia plua por kaj peresperanta agado. (Rimarko: plena teksto de la rezolucio en Esperanto estas havebla en Esp.Sekcio laŭ adreso: Moskvo K-9, ul. Hercena, 19. Sovetio). I.02.62. en apudmoskva (100 km.) urbo Kolomna renoviĝis esperanta movado, kie en kulturpalaco de Lokomotivkonstrua uzino je nomo de V. V. Kujbiŝev estis organizita publika prelego pri Esperanto, kiun faris la loka inĝeniero k-do E. Zajdman; lian prelegon ilustris per recito de Esperantaj poemoj aktoro N. N. Rytjkov. Ĉeestis pli ol 200 personoj. II.02.62. K-do N. Rytjkov komunikis, ke en N II por 1961 j. de rusa gazeto "Sovetunio" estis publikigitaj salutoj al kosmonauto G. Titov en multaj lingvoj inter kiuj estis menciita Esperanto. 18.02.62. oni aranĝis solenan vesperon, dediĉitan al klasikulo de rusa poezio A. S. Puŝkin. La vesperon malfermis per enkonduka vorto profesoro E. Bokarev. Kun vasta kaj detala raporto pri Puŝkin kaj Esperanto elpaŝis k-do N. F. Danovskij. En sia lerta, bela kaj elokventa parolo li brile rakontis pri granda signifo de Puŝkin'aj poeziaĵoj en tutmonda kul-



turo kaj socia vivo. Nun estas tradukitaj esperanten ĉiuj la plej gravaj verkoj de Puŝkin; entute estas tradukitaj pli ol 100 diversaj poeziaĵoj kaj noveloj. La vesperon ceestis pli ol 70 personoj. 21.02.62, komencis labori nova elementa kurso de Esperanto. Gvidas k-do I. N. Jermolaev kurson kun 10 enskribiĝintaj medicinistoj. 25.02.62. Profesoro S. Ĉaĥotin rakontis pri la interesiĝo al Esperanto en sciencaj rondoj de Moskvo kaj pri granda amiko de Esp-o — akademiano Berg. K-do Ŝumilov rakontis pri la klopodoj por oficialigo de SEU. Poste okazis diskuto pri plibonigo de Esperanta laboro en la Sekcio. 4.03.62. estis junularkunveno de "Fajrero"; ĉeestis 40 personoj. K-do A. Harkovskij raportis pri taskoj de esp-a junularo, pri statuto de junulara esp-a organizaĵo, pri reciproka laboro kun plenaĝuloj, pri specialaj taskoj de junularo. 11.03.62. K-dino A. I. Gorbunova el Leningrad transdonos varman saluton de Leningradanoj kaj rakontis pri eldono en L-do de Sutkovoj rusa-esperanta vortaro rotaprinte, prezo 31 kop. kaj pri aktiva esp-a agado de Taŝkentaj (Uzbeka SSR) Esperantistoj - fervojistoj. D-do B. V. Tokarev informis la ĉeestantojn pri la kreo de komisiono en Sovetunio por preparado de materialoj al unua internacia konferenco Esperanta de sciencistoj, kiu okazos dum 47-a U.K. en Kopenhago kaj pri kiu komunikis en No I de revuo internacia "Esperanto" s-ro Paul Neergaard.

#### Svedujo

● **Nova speleologia verko de Leander Tell:** "Die Höhlentypen Schwedens", (Eld. Förlag Centrocommerce A/B, Norrköping, Svedujo), enhavas resumojn en angla, franca, sveda kaj Esperanto. S-ano Tell estas, kompreneble, la aŭtoro de la verko "La Bela Subtera Mondo" (Eld. Stafeto).

#### Usono

● **En "The Tampa Times" (Florida)** de la 24a de marto aperis el la plumo de s-ino Polly Henry intervjuo kun esperantisto George E. Wagner. La intervjuo estas tre juste kaj serioze raportita, kaj aperis ankaŭ foto de la intervjuito.

● **Nova vigla Klubo en Pitsburgo, Pensilvanio, Usono.** Post kelkjaraj klopodoj en Pitsburgo, Esperanto Klubo nun estas realaĵo. Pli ol 300 personoj en Pitsburgo kaj ĉirkaŭaĵo partoprenis kursojn en tiu granda ŝtal-produktejo (La plej granda en Usono!) Kursoj estis aranĝitaj en multaj partoj de la urbo, interalie sub la aŭspicioj de universitato, vesperlernejoj kaj kristan-asocioj, aŭ en la kadro de iliaj plenaĝulaj instru-planoj. Tre kuraĝiga estas la fakto, ke sufiĉe granda nombro da kursanoj estas geinstruistoj en la publikaj lernejoj, sed ankaŭ profesiuloj de multaj aliaj fakoj troviĝas inter la aktivaj membroj de la nova klubo.

● **Scienca Esperanto-Fako de Iberia Translations** el Nov-Jorko, fondita antaŭ kelkaj monatoj por disvastigi Esperanton tra la sciencaj, universitataj kaj oficialaj medioj en Usono, post intensa preparado sukcesis organizi kurson ĉe UNO. Fernando Martínez, la prezidanto de S.E.-F., pretigis specialan afiŝon por la bultentabelo ĉe UNO kaj presigis diversajn propagandmaterialojn. F-ino Yolande Ravenet, membro de UNO, vigla samideanino, entuziasme distribuis la materialon tra la membraro. Krome, ŝi publikigis en "Secretariat News" (du-semajna revuo eldonita de UNO por interna distribuado inter iliaj 4000 membroj) specialan interesan kaj trafan alvokon koncerne la kurson. La rezultato estis tre kuraĝiga: ĉirkaŭ 30 personoj aliĝis, kaj la **inaŭguro de la kurso okazis la 2an de aprilo**. Estas du klasoj po semajno, de la 6.30 ĝis la 8a vespere. Ekde nun, kun la sindonema helpo de f-ino Ravenet, Scienca Esperanto-Fako publikigos unu kolonon pri E. en ĉiuj numeroj de "Secretariat News", pri la disvolviĝo de la kurso, pri specialaj programoj ĉe UNO (prelegoj, sonbendoj, filmoj, k.a. en E.), pri la formado de estontaj kursoj, pri la simpozio kun la partopreno de f-ino Joŝiko Kaĵino el Japanio kiu nun propagande vojaĝas tra Usono, pri specialaj okazaĵoj, ktp.

S-ano Martínez verkas nun broŝuron speciale por UNO-membroj pri la graveco de E. kaj la neceso de helpa lingvo internacia ĉe UNO, titolita "Esperanto-The Solution for the Modern Tower of Babel", kaj ĝi estos ĝentile distribuata de f-ino Ravenet. Tiamaniere S.E.-F. senlace agos por pligrandigi la nombron de esp-istoj ĉe la monda organizaĵo kaj por influi en ĝiaj altaj sferoj por ke oni donu gravan rolon al E. kaj favori la enkondukon kaj uzadon de nia lingvo en tiu gravega medio, kiu estos mondkala en amplekso. Konsiderante la gravecon de ĉi tiu agado, oni petas la tutmondan esperantistaron, kaj precipe la organizaĵojn, ke ili sendu materialojn por distribuado ĉe UNO, al Scienca Esperanto-Fako de Iberia Translations, 130 West 57th St. (Suite 6-B), New York 19, N.Y., Usono, kaj gratulajn kaj kuraĝigajn poŝtkartojn aŭ leterojn al entuziasma kunlaborantino Yolande Ravenet, Room C-112, United Nations, New York, N.Y., Usono.

#### ESPERANTISTA VIVO

**Piron.** Al Claude kaj Nicole Piron-Sabathé en Ĝenevo naskiĝis la 1-an de aprilo 1962 filino nomita Françoise.

#### Fianĉiĝo

**Gobourne-Lloyd.** Gefianĉiĝis John Gobourne el Wolverhampton kaj Audrey Lloyd el Wednesbury (Britujo), ambaŭ anoj de Junularo Esperantista Brita.

#### NEKROLOGO

**Hartley.** La 31an de marto 1962 subite mortis sekve de strata akcidento en Manĉestro, Anglujo, 43-jara John Hartley. Li estis kunlaboranto en la populara anglalingva lernolibro "Teach Yourself Esperanto". Talenta komerca artisto profesie, li desegnis la kovrilojn de la libroj en la serio Stafeto. Stafeto.

**Masterman.** Kerrin Masterman, kies fianĉiĝon ni anoncis nur en la aprila numero de nia revuo, mortis la 5an de majo en aŭtomobila akcidento. La fianĉino, ŝia patrino kaj s-ano Humphrey Tonkin estis grave vunditaj. Kerrin, kiu estis preskaŭ 23-jara, lernis Esperanton en 1957, kaj estis nove elektita Sekretario de Junularo Esperantista Brita.

**Meyerhuber.** La 11an de aprilo mortis en Augsburg Elise Meyerhuber.



#### 47-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago, 4-11 Aŭgusto 1962

Sub la Alta Protektado de la Dana Cefministro Viggo Kampmann.

Konstanta Adreso: ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

#### OFICIALA KOMUNIKO

Rotterdam, la 2-an de majo 1962

No. 8

#### Fervojaj Rabatoj.

Krom el la jam pli frue anoncitaj landoj (Danlando, Hispanujo, Francujo, Hungarujo, Norvegujo, Svedujo), nun ankaŭ el Pollando ni ricevis informon ke la tiea Ŝtata Fervojo donos rabaton de 25% al kongresanoj aĉetantaj revenbileton.

#### Hamburga fervoja karavano:

kun minimume 10 personoj =

33 1/3% rabaton,

kun minimume 25 personoj =

50% rabaton;

ekveturo de Hamburgo tra Grossenbrode — Gedser (entute 7 horojn) vendredon, la 3-an de Aŭgusto, aŭ laŭ decido de la plejmultaj partoprenantoj eble sabaton la 4-an de Aŭgusto 1962, reveturo sabaton la 11-an aŭ dimanĉon la 12-an de Aŭgusto 1962. Aliĝojn petas kaj informojn donos: Hella Lanka, fakdelegitino de U.E.A. por turismo, Hamburg 39, Sierichstr. 148.

#### Tendumejoj.

En la ĉirkaŭaĵo de Kopenhago troviĝas bonaj tendumejoj. La prezo estas d.kr. 1,50 por unu persono ponokte kaj d.kr. 1,50 por aŭtomobilo. Antaŭmendado ne estas necesa, sed estas dezirinde



ke la interesitoj sinanoncu ĉe la adreso de la 47-a Universala Kongreso.

#### Adoptaj Gepatroj.

Eksterordinare malmultaj estas la kontribuoj, kiujn ĝis nun ricevis tiu ĉi Fondaĵo.

Dankante al tiuj, kiuj jam sendis sian malavaran kontribuon (iliaj nomoj estos menciitaj en la Kongresa Libro), ni varme apelacias al ĉiuj esperantistoj, por ke ili, per siaj donacoj, ebligu la partoprenon en la 7-a Internacia Infana Kongreseto al in-

fanoj, kiuj, alimaniere, ne havas la eblecon sperti la ĝojon de komuna internacia vivo.

Ne nur unuopuloj, sed ankaŭ lokaj kluboj povas "adopti" infanon.

La kotizo por la Fondaĵo "Adoptaj Gepatroj" estas ned. gld. 30, sendendaj al la landaj perantoj aŭ rekte al la adreso de U.E.A.

**Statistiko** (ĝis fino de aprilo) :

Arabujo 1, Argentino 3, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 7, Belgujo 16, Brazilo 4, Britujo 137, Bulgarujo 17, Danlando 217, Finnlando 42, Francujo 101, Germanu-

jo 128, Grekujo 2, Hindujo 1, Hispanujo 8, Hungarujo 8, Irlando 1, Islando 2, Israelo 3, Italujo 55, Japanujo 10, Jugoslavio 36, Kanado 1, Libano 1, Madagaskaro 1, Meksikio 3, Monako 2, Nederlando 90, Norvegujo 23, Nov-Zelando 1, Pollando 28, Portugalujo 7, Sovetunio 1, Svedujo 152, Svisujo 16, Usono 15. Entute 1141 el 36 landoj.

**Lasta informo** : Je ekspreso de tiu ĉi numero aliĝis entute 1260 kongresanoj.

G. G. Pompilio  
Konstanta Kongresa Sekretario

## UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

NIEUWE BINNENWEG 176 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

### OFICIALA INFORMILO

N-ro 349

STATISTIKO. Jen stato de la membraro je la fino de aprilo kaj ankaŭ por komparo je la fino de aprilo 1961.

|                    | 1961  | 1962  |
|--------------------|-------|-------|
| Asociaj membroj    | 4937  | 8476  |
| Individuaj membroj |       |       |
| MJ                 | 665   | 634   |
| MA                 | 4340  | 4462  |
| MS                 | 436   | 421   |
| Pat.               | 1     | 1     |
| DM                 | 407   | 428   |
| HM                 | 43    | 40    |
| J-MJ               | 23    | 15    |
| J-MA               | 127   | 131   |
|                    | 6042  | 6132  |
|                    | 10979 | 14608 |

#### DELEGITOJ

##### Belgujo

**Lokeren** (Oost-Vlaanderen). 27.000.

D : S-ro H. Audenaert, substaciestro, Beekstraat 6.

FD (Fervojoj) : vakas.

FD (Vegetarismo) : la D.

##### Brazilo

**Belo Horizonte** (Minas Gerais). 700.000.  
JD: S-ro E. Pacheco Barbosa, desegnisto, C.P. 1115, Rua José de Alencar 188.

**Curvelo** (Minas Gerais). 50.000.

D : S-ro C. De Carvalho, katolika pastro, Rua João Pessoa 88. Tel: 1288.

FD (Astronomio) : la D.

FD (Religio Katolika) : la D.

**São Paulo** (Sao Paulo). 3.800.000.

FD (Dentistaj aferoj) : S-ino A. Sellmeister de Oliveira Bueno, dentkuracisto, Rua Antonio Carlos 395. Tel : 31-60-29.

##### Britujo

**Haydon Bridge**.

D : vakas.

**Leicester**.

FD (Vegetarismo) : vakas.

**Manchester**.

FD (Arto kaj Grafiko) : vakas.

##### Ĉeĥoslovakujo

**Plzeň** (Čechy). 150.000.

FD (Konstruado) : S-ro F. Mareš, konstrua projektisto, Tělocvičná 24. Tel : 278085.

##### Danlando

**Helsingør** (Sjaelland). 27.000.

VD: S-ro M. R. Andersen, instruisto, N. Strandvej 4.

FD (Instruado) : la VD.

**Herning**. 25.000.

FD (Konstruado) :

S-ro H. A. Pedersen, arkitekto, Fynsgade 18. Tel : 3956.

**København**. 1.000.000.

FD (Fotografio) : S-ro C. Hougaard, verkisto, Vigerslevallé 176c, København-Valby. Tel : 01-300463.

**Skive** (Jylland). 15.500.

D : S-ro A. Kolle, poŝtoficisto, Nørregade 33. Tel : 1125 (oficejo).

FD (Poŝto) : la D.

**Skrave** (Sønderjylland). 800.

FD (Edukado) : S-ro H. Monrad Christensen, instruisto, Skrave skole, pr. Skodborg J. Tel : Københoved (048) 3 72 23.

##### Francujo

**Caluire** (Rhône). 27.000.

FD (Instruado) : F-ino B. Clavier, emerita instruistino, 25 rue Jamen-Grand.

**Hyères** (Var). 30.000.

FD (Filozofio) : S-ro E. Gasse, eksasekuristo, B. 25 Place Th. Lefèvre.

**Paris**.

FD (Internacia libervola civila servo) : vakas.

**Roanne** (Loire).

D : D-ro J. Dumas, helpkuracisto, Internat Hôpital rue de Charlieu.

Tel : 49-41 kaj 49-42.

FD (Medicino) : la D.

**Rueil-Malmaison**.

D : vakas.

**St. Laurent du Var** (A.M.). 7000.

D : S-ino R. Luquet, Allée Zamenhof, Ave du Plateau fleuri.

**Villeurbanne**.

FD (Geografio) : vakas.

FD (Literaturo franca) : vakas.

**Yerres** (S. et O.). 7.000.

FD (Edukado) : S-ro A. Bertin, konsilisto pri lernad- kaj profesiorientigo, 3 rue des Champs Blancs. FD (Naturismo) : la FD (Edukado).

##### Germanujo

**Frankfurt a.M.** (Hessen). 675.000.

D : F-ino N. Hartwich, advokata sekretariino, Krögerstrasse 11, Frankfurt a.M.1.

##### Hispanujo

**Alberique** (Valencia). 8.500.

D : S-ro F. Giménez Chornet, oficisto, Strato Calvo Sotelo 11.

**Barcelona** (Cataluña). 1.500.000.

FD (Komerco) : vakas.

FD (Naturismo) : S-ro L. Armadans, oficisto, Plaza Sagrada Familia, na 4, 4º, 3a.

**Gargüera** (Cáceres). 700.

D : S-ro A. Agudo Acuña, sacerdoto.

**Manresa**.

D : vakas.

**Oliva** (Valencia). 20.000.

D : D-ro V. Pedro Signes, eksportisto, Monjas Clarisas 20. Tel : 353.

**Palencia** (Palencia). 50.000.

D : S-ro E. Marbán, tajloro, Hotel Iberia aŭ Mayor 15 "Tegidos Espergel". Tel : 2148 kaj 1932.

**Palma de Mallorca** (Islas Baleares). 160.000.

FD (Juro) : S-ro A. J. Arbona, advokato, Velázquez 18. Tel : 15950.



**San Feliu de Llobregat** (Barcelona). 12.000.  
FD (Mekaniko) : S-ro J. Isern Cartañá, mekanikdesegnisto, Calle Gerona no. 24 letra I, 3er piso.

**San Pablo de Ordal** (Barcelona). 800.  
D : S-ro L. M. Hernandez Yzal, farmaciisto, Ave Generalismo 13, Apartado de Correos 83. Tel : 5.

**Tabernes de Valldigna**.  
D : vakas.

**Vilafranca del Penedes** (Barcelona). 13.000.  
D : S-ro R. Sans-Compte, komercisto, Ave. Tarragona 16. Tel : 458.

**Hungarujo**

**Kisujzállás**. 16.000.  
D : S-ro P. Rézsó, difektologia profesoro, Pf. 20. Tel : 109 (Instituto).

**Italujo**

**Biella** (Vercelli). 60.000.  
FD (Komerco de periodaĵoj) : S-ro P. Vassallo, Via Italia 92.

**Bologna** (Emilia). 450.000.  
FD (Korespondado) : S-ino L. Bartolini-Bifulco, Piazza Sette Novembre 6. Tel : 266825.

**Laveno** (Varese). 7.500.  
D : S-ro G. Spertini, studento, Via Nazario Sauro 6. Tel : 61.173.  
FD (Studentaj aferoj) : la D.

**Menfi** (Agrigento). 12.000.  
D : S-ro G. Bilello Palagonia, ŝipkonstruisto kaj kampomezuristo, Via della Vittoria 205. Tel : 206.

**Meolo** (Venezia). 4.500.  
JD : S-ro G. Lucchetta, studento.

**Modena** (Emilia). 141.000.  
D : F-ino M. Mordacci, oficistino, Via G. Puccini 104. Tel : 36780.  
VD : F-ino F. Feretti, instruistino, Via Sadoletto N 7. Tel : 31.012.

**Santarcangelo** (Forlì). 15.000.  
D : S-ro A. Gambuti, librotenisto, Viale Mazzini 31/6.

**Trieste**. 300.000.  
FD (Ĥemio) : S-ro C. de Manzini, studento, Via Murat 16. Tel : 25083.

**Varese**.  
D : vakas.  
FD (Natur-scieno) : vakas.

**Jugoslavio**

**Beograd**.  
JD : vakas.

**Dubrovnik**.  
FD (Arto) : vakas.

**Koprivnica** (Hrvatska). 10.000.  
D : S-ro F. Petričević, oficisto, Basaričekova 14. Tel : (oficejo) 262.  
FD (Agronomio) : vakas.

**Ljubljana** (Slovenija). 140.000.  
FD (Industrio) : vakas.  
FD (Instruado) : vakas.  
FD (Sporto) : vakas.

**Mostar**.  
FD (Geografio) : vakas.

**Nova Gorica**.  
D : vakas.

**Novi Sad** (A. P. Vojvodina). 100.000.  
D : S-ro J. Vécsey, vitrajisto, Gogoljeva 40.  
VD : S-ro F. Fodor, instruisto, M. Dimitrijevića 72.

FD (Financoj) : vakas.  
FD (Juro) : vakas.  
FD (Komerco) : vakas.

**Split**.  
VD : vakas.

**Zagreb**.  
VD : vakas.

**Kanado**

**Québec** (Québec). 350.000.  
D : S-ro J. Gaucher, vojaĝoficejestro, 231, du Long-Sault, Quebec 10, P.Q. Tel : 653-7186.  
FD (Transporto aeroplana) : la D.

**Madagaskaro**

**Tananarive**. 180.000.  
FD (Religio : Bahaismo) : S-ro P. Razanabahoaka, kontoristo, B.P. 1336.

**Meksikio**

**Mexico** (Distrito Federal). 5.000.000.  
FD (Medicino) : D-ro P. Magaña Erosa, kuracisto, Tepeyac 94, Colonia Industrial, Mexico 14, D.F. Tel : 17 11 43.  
FD (Turismo) : S-ro E. Arias Garcia, oficisto, Retorno E. Zapata 18.

**Nederlando**

**Alkmaar** (N-H.). 43.000.  
VD : S-ro C. Joon, librotenisto, P. C. Hooftstraat 136.  
FD (Filozofio) : la D.

**Leeuwarden** (Friesland). 83.000.  
VD : F-ino A. A. Laverman, instruistino, Julianalaan 81. Tel : 24277.  
FD (Instruado) : la VD.  
FD (Laktproduktoj) : S-ro Y. P. Kingma, eksdirektoro Buterofabriko, Koekoekstraat 8. Tel : 25460.  
FD (Urbeŝtrara administrado) : F-ino Y. Weidema, urbadministra oficistino, Curaçaostr. 16. Tel : (05100) 20172.

**Vlissingen**.  
D : vakas.

**Nepalo**

**Kathmandu**. 230.000.  
VD : S-ro B. M. Maskey, studento, 69 Bangamudha.  
FD (Kulturo) : S-ro P. Joshi, instruisto, 10/327 Chikan Ata.  
FD (Turismo) : la VD.

**Norvegujo**

**Oslo**.  
FD (Turismo) : vakas.

**Pollando**

**Wrocław**.  
FD (Juro) : vakas.

**Svedujo**

**Arboga** (Västmanland). 11.000.  
D : S-ro K. E. Bergström, elektristo, Karl Knutssonsgatan 4.

**Stockholm**.  
FD (Presado) : vakas.

**Västerås**.  
D : vakas.

**Svislando**

**Arbedo**.  
D : vakas.  
FD (Fervojoj) : vakas.

**Basel** (Basel). 225.000.

D : S-ro K. Schweizer, instruisto, In den Neumatten 51, Riehen-Basel. Tel : 32 93 26.

**Bern**.  
FD (Bankaj aferoj) : vakas.

**Biasca** (Ticino). 3400.  
D : S-ro R. Gotti, fervojisto, Stazione.

**Langenthal** (Bern). 11.000.  
FD (Purigado de teksaĵoj) : S-ro M. Führer, tinkturisto, ĉe Kleiderreinigung Gebr. Grogg, Aarwangenstr. 65, Postf. 153.

**Lausanne** (Vaud). 130.000.  
FD (Mondfederalismo) : S-ro K. Curchod, rue du Valentin 45. Tel : (021) 22 54 98.

**Riehen**.  
D : vakas.

**Urnäsch** (Appenzell). 2400.  
D : S-ro W. Flammer, pastro, Zürchersmühle. Tel : 071/58281.  
FD (Religio katolika) : la D.

**Vevey** (Vaud). 17.000.  
FD (Pripacaj aferoj) : S-ro K. Hiltbold, eksmekanikisto, Chemin de Cornalles 10, Corseaux.

**Zürich**. 470.000.  
FD (Fervojoj) : S-ro W. Schaufelberger, lokomotivestro, Imfeldstr. 99. Tel : (051) 28 69 42.  
FD (Numismatiko) : la D.  
FD (Pentro-arto) : S-ino A. Masé, peltistino, Elisabethenstr. 3/V, Zürich 4.  
FD (Religio) : S-ro G. Künzli, komerca salajrulo, Schöntalstr. 1. Tel : (051) 25 74 99.

**Usono**

**Avon**.  
D : vakas.  
FD (Kristanismo) : vakas.

**San Diego**.  
D : vakas.  
VD : vakas.  
FD (Konstruado) : vakas.

**Venezuelo**

**Caracas**.  
FD (Naturscienco) : vakas.

**NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ**

Starr, S-ro Mark, Long Island City, Usono.  
Weil, S-ro K., München, Germanujo.

**MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1962**

327. Lassen, S-ro A., København, 328. Rude, S-ro V., Stenlille, 329. Schleicher, S-ro Ib, København, 330. Schröder, S-ro O., København, Danlando; 331. Boiton, F-ino M. T., Granges les Valence, 332. Marly, S-ro P., Bordeaux, 333. Poly, S-ro P., Paris, Francujo; 334. Beaucaire, S-ro L., Berlin, 335. Bechtold, S-ro L., Gladenbach, 336. Bettges, S-ro J., Duisburg-Meiderich, 337. Brückner, S-ro M., Stolberg, 338. Daum, S-ro H., Wiedenbrück, 339. Gerwin, S-ro R., Lobberich, 340. Oeste, S-ro W. T., Köln, 341. Schumacher, S-ro F., Karlsruhe, 342. Schumacher, F-ino M., Hildesheim, Germanujo; 343. Castelltort Riba, S-ro J., Igualda, 344. Circulo Mercantil, Málaga, 345.



Perarnau, S-ro J., Tarrasa, 346. Solá, S-ro M., Tarrasa, 347. Tonico, S-ro T., Granollers, Hispanujo; 348. Lacalendola, Prof. A., Bari, 349. Pacelli, Prof. G., Pisa, 350. Selan, Gen. U., Roma, 351. Zacchè, S-ro F., Mantova, Italujo; 352. Jovanović, S-ro Ž., Niš, Jugoslavio; 353. Collins, S-ro E., Toronto, Kanado; 354. Frutoso, S-ro P., Meknes, 355. Gomez, F-ino A., Meknes, Maroko; 356. Enkelaar, S-ro P., Zeist, 357. Hoekma, S-ro A., Den Haag, Nederlando; 358. Armanis, S-ro A., Lier, 359. Engen, S-ro P., Drammen, 360. Nesje, S-ro H., Aalesund, 361. Reisaeter, S-ro T., Odda, Norvegujo; 362. Amaral, Inĝ. H. Funchal, Portugalujo; 363. Dickson, S-ino M. E., Cape Town, Sudafriko; 364. Ahlström, F-ino M., Göteborg, 365. Akerberg, S-ro B., Hägersten, 366. Akselson, S-ro H., Stockholm, 367. Almén, S-ro H., Stockholm, 368. Andersson, S-ro A., Falun, 369. Brandemar, S-ro N., Stockholm, 370. Carrfors, S-ino S., Brommā, 371. Colliander, S-ino M., Hägersten, 372. Diamant, S-ro G., Göteborg, 373. Engholm, S-ino O., Söderbärke, 374. Fingalsson, S-ro B., Gisebo, 375. Frisk, S-ro K., Örebro, 376. Lind, F-ino E., Stockholm, 377. Ljungberg, S-ino A., Stockholm, 378. Lundin, Inĝ. H., Örebro, 379. Nilsson, S-ro T., Vattjom, 380. Ohlsson, S-ro C., Stockholm, 381. Olsson, F-ino A., Göteborg, 382. Olsson, S-ro E., Badabruk, 383. Ottosson, F-ino I., Vällingby, 384. Pettersson, S-ro F., Solna, 385. Sedendahl, S-ro W., Uppsala, 386. Snarberg, S-ro J., Stockholm, 387. Stenberg, S-ro B., Falkenberg, 388. Stenström, S-ro J., Jönköping, 389. Sundborg, S-ro E., Göteborg, 390. Svedmark, F-ino A., Stockholm, 391., Tell, S-ro L., Norrköping, 392. Tyle, F-ino S., Stockholm, 393. Wingefalk, S-ro R., Ånge, Svedujo; 394. Brya, S-ro A. M., Urbana, 395. Chobanoff, D-ro S., Lanham, 396. Falgier, S-ro G., St. Louis, 397. Okun, S-ro A. H., Monticello, 398. Pauling, S-ro W., Eau Gallie, 399. Pollock, S-ino M., Pacific Palisades, 400. Vineski,

S-ro R. T., Danville, Usono; 401. Gama, S-ro J. de Oliveira, Juiz de Fora, Brazilo; 402. Livett, S-ro L. G., Riddlesden, 403. Morton, F-ino H. R., London, Britujo; 404. Zacho, S-ino, Brønshøj, Danlando; 405. Belhoste, S-ro L., Fontenay-sous-Blois; 406. Dalier, S-ro H., Mauleon-Soule; 407. Levy, F-ino B., Bar sur Aube, Francujo; 408. Bep-perling-Wolff, S-ino A., Wetzlar, Germanujo; 409. Diez, S-ro S., Valencia, Hispanujo; 410. Sgroi, S-ro Rag. R., Catania, Italujo; 411. Raymond, S-ro H., Casablanca, Maroko; 412. Thorvaldsen, S-ino E., Asker, Norvegujo; 413. Lundsuist, F-ino G., Ystad; 414. Pålsson, S-ro H., Hässleholm, Svedujo; 415. Moline-Culbert, S-ino R. L., Tacoma, 416. Culbert, D-ro S. S., Seattle; 417. Culverwell, S-ro J. F., Hawthorne, 418. Milsted, S-ro H. B., Zanesville, 419. Noda, S-ro K., New York, Usono.

#### DONACOJ AL A.P.O.

S-ro P. Williams, Nov-Zelando, 2,50 gld.; S-ro B. Resch, Usono, 18 gld.

#### FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 18.737,52 gld.

S-ro P. Williams, Nov-Zelando, 2,50 gld.

Entute : 18.740,02 gld.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio, por firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-jaro !

#### FONDAJO PROF. CANUTO

Antaŭa stato : 251 MA, 33 MJ, 7 J-MJ kaj 1 J-MA.

S-ro I. Helsingius, 1 MA; "Noktaj Gekukuloj", 1 MA; M. Oksala, 1 MA; S-ro Pyykönen, 1 MA; S-ro N. Tumi, 1 MA; S. Voikka, 1 MA; J. Vilkki, 2 MA; ĉiuj Finnlando.

Entute : 259 MA, 33 MJ, 7 J-MJ kaj 1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A. (Vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

#### FONDAJO DOMO

Rot. Esp. Soc. "Merkurio", Nederlando, 10.— gld.; Klubo "Tra la Mon-

do", Nederlando, 10.— gld.; F-ino A. H. G. van Vliet, Nederlando, 10.— gld.; S-ro P. Williams, Nov-Zelando, 2,50.

Ĉiuj nomoj estas enskribitaj en la "Ora Libro pri la Domo". Malavare donacu por la propra sidejo de la asocio !

#### DONACO AL INTERNACIA ARTA TEATRO

S-ro L. Leon, Britujo, 7,63 gld.

#### DONACOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro A. Hughes, Usono, 4,50 gld.; D-ro A. Mackay, Usono, 71,80 gld.; S-ro B. Resch, Usono, 18 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.  
Direktorino C.O.  
M. H. Vermaas

## ANONCETOJ

**Feriu en Dovro !** Mendu gvidlibron kun multobligita teksto en Esperanto, po 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro, ĉe Esperanto-Civito, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo. La unua paŝo al broŝuro tute en Esperanto, kun oficiala subteno.

**Esperanto-parolata 1962**, vendas Libro-servoj kaj Eldoninto : M. Rétot, 162 A. Briand, Montreuil (Seine), Francujo. 4 respondkuponoj - 5 steloj - 1,80 NF. (afrankite) : poŝtkonto Paris 1042-07.

**Skribu el la tuta mondo por nia oktobra letervespero.** Afranku filatele. Garantiata respondo - Chambaz, 44 rue du Haut-Pavé, Etampes, S. & O., Francujo.

**Skribgeamikoj** estas bonvenaj : S-ino A. Granlöff, Skönsberg, Svedujo.

**La Esperanto-Societo de Kathmandu**, adreso : Basantpur, Kathmandu, Nepalo, deziras interŝanĝi Esperantajn librojn kontraŭ nepalaj kaj hindaj poŝtmarkoj.

**Lerneja rondo "Grajnoj en Vento"** deziras korespondi kun samaj rondoj en la tuta mondo. Adreso ĉe la instruistino : M. Blonska, gimnazjum Im. Wladysława IV, Esperanto-Rondo "Grajnoj en Vento", Jagiellonska 38, Warszawa-Praga, Pollando.

**Kanado** : 200 pacamantinoj, membroj de "Voĉo de Virinoj", nun lernas Esperanton por korespondi kun vi. Skribu aĝon, profesion kaj interesojn al Vilma Eichholz, Esperanto, Oakville, Ontario.

**Letervespero.** Por celebri la 10-an datrevenon de sia jura personeco, Gvatemala Esperantista Asocio, en Gvatemalo, Mezameriko, organizas letervesperon dum Aŭgusto kaj petegas ke sendu multegajn salutleterojn la samideanaro de la tuta mondo. Speciala dankoza respondo al ĉiu sendanto !

**Montru al ni vian landon** per belaj bildkartoj. Esperantistaj gefianĉoj, okaze de sia geedziĝo aranĝas letervesperon la 15-an de oktobro 1962. Respondo certa. S-ro Rafael Ayala - Generalísimo, 243 - Barcelona-13 (Hispanujo).

## RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.

**Radio Roma.** 1-VI, Grandaj italaj operkantistinoj : Gemma Bellincioni; 5-VI, Tra la literaturo; 8-VI, Leterkesto kaj bibliografio; 12-VI, Pentekosto; 15-VI, Italujo kaj fremdaj komponistoj : Gounod en Romo; 19-VI, Italaj kazonoj en Esperanto; 22-VI, Novaĵoj el Italujo; 26-VI, Elfositaj etruskaj urboj : Spina; 29-VI, Grandaj romaj baziliko; S-ta Petro. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj : S-ro L. Minnaja kaj Prof. D-ro V. Musella.

**Ĉeĥoslovaka Radio** elsendos sesminutan programon inter 17.45 kaj 18.00 la 28-an de Junio per ondoj 233m. (1286 kcs.) pri la temo : Esperantistoj en Pilsen.

**Atentu** : Informoj pri ŝanĝitaj ondlongoj kaj horoj de la stacioj Warszawa, Sofia kaj Hilversum aperis en la maja numero. Bonvolu noti ilin ĝis la publikigo de la nova kompleta tabelo en Julio.

**Usona Radio.** La 22-an de Marto, la stacio WWDC en Washington dissendis paroladon en angla lingvo pri Esperanto; la prelegantoj estis S-ro William E. Baff, delegito de UEA, kaj D-ro Stefan Chobanoff.

**S-ro Bong Joo Kim** (21-jara) (lernanto mondon.

de jurfakultato), Taegu College Espe-  
ranto-Instituto, Taemyung Dong,  
Taegu, Korea (Suda), volas korespondi  
kaj interŝanĝi bildkartojn tra tut-

**D-ro Rama Hegde**, Bombajo, Hindujo,  
la 1-an de majo 1962 translokiĝis al  
Margão-Gôa, Hindujo.  
**Nova ideo**, nia sessemajna rapideg-

kurso. Subtenu ĝin tuj samideane per  
multe da salutkartoj al Esperanto-  
Grupo, (643) Bad Hersfeld (Okc. Ger-  
manujo), Unt. Frauenstr. 4 - Respondo  
garantata.

## **Lastmomente**

### **MORALA ALIĜO AL LA UNIVERSALA KONGRESO EN KOPENHAGO**

Meze de junio la nombro de aliĝintoj al la Universala Kongreso en Kopenhago estis 1320. Tutcerte en la sekvantaj tagoj kaj semajnoj multaj personoj, kiuj hezitis aliĝi, faros tion kaj partoprenos la mondan manifestacion de la esperantismo, al kiu ĉi-jare estas ligita la gravega konferenco pri la lingva problemo en la scienco. La interesa programo estas jam konata kaj per si mem prezentas ĉiaspecajn allogaĵojn. Aliflanke, Kopenhago estas tiel interesa urbo, ke ĉiu kiu vizitis ĝin unu fojon, deziras tion fari denove. La L.K.K. do fidas, ke ĉiu, kiu iel povas, aliĝos al la Kongreso kaj partoprenos en ĝiaj laboro, kulturaj aranĝoj kaj multnombraj distraĵoj.

En interkonsento kun la ĝenerala sekretario de U.E.A. kaj la estrarano pri financoj, la L.K.K. decidis enkonduki ĉi-jare specialan kategorion de aliĝo sub la nomo "Morala Aliĝo". La L.K.K. opinias, ke ekzistas multaj esperantistoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povas persone partopreni la Kongreson, sed deziras doni al ĝi sian apogon, ricevi la kongresajn dokumentojn kaj entute iamaniere spirite ligiĝi al la Kongreso. Tio estas la senco de la "Morala Aliĝo".

La kotizo por tiu aliĝo estas 15 ned. guldenoj aŭ 30 danaj kronoj. Ĉiu aliĝinto en tiu kategorio ricevos la la kongresan libron kaj aliajn kongresajn dokumentojn, sed ne rajtas persone ĉeesti la kongreson. La kotizon oni bonvolu tuj pagi al la C.O. de U.E.A., al la ĉefdelegitoj kaj perantoj aŭ al la L.K.K. de la 47-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, kun klara mencio "Morala Aliĝo".

### **Vestaĵoj dum la Universala Kongreso**

Kelkaj aliĝintoj miskomprenis la konsilojn de la L.K.K. rilate la vestaĵojn dum la solenaj kaj festaj aranĝoj de la Universala Kongreso en Kopenhago. Tial la L.K.K. precizigas, ke estas nur **tre dezirinde**, sed ne **devige**, ke la kongresanoj surhavu malhelajn vestaĵojn kaj la kongresaninoj adekvatajn robojn dum la inaŭguro, oficiala akcepto, bankedo, balo kaj similaj aranĝoj. Same tiel la smokingo por sinjoroj kaj balrobo por sinjorinoj estas neniel devigaj sed plene libervolaj dum la bankedo kaj balo. Tamen la L.K.K. insiste petas, ke almenaŭ dum la menciitaj aranĝoj — kaj laŭ ebleco entute — oni nepre ne surhavu vestaĵojn nekonformajn al la karaktero de tiuj aranĝoj.

Tiu ĉi rekomendo estas farita ekskluzive en la intereso de la prestiĝo de la Esperanto-movado kaj de ĝia monda manifestacio, ĉar L.K.K. opinias, ke ankaŭ per sia ekstera aspekto la kongreso devas reflekti la seriozecon de la afero de la Internacia Lingvo.

### **JARLIBRO 1962**

**PRO LA TRANSLOKIĜO DE LA CENTRA OFICEJO BEDAŬRINDE PROKRISTIĜAS LA APERO DE  
LA JARLIBRO**



## TENERIFE

Ĉu vi ŝatus posedi dometon sur la rava insulo en Atlantiko?

Ni konstruos laŭ via gusto! Internacia atmosfero!  
Ĉiama printempo!

Nenia hejtproblemo! Nenia atomtimo!  
Belegaj terenpecoj kun panorama rigardo, en Puerto, disponeblaj.

Petu informojn de N-ro 200, gazeto **ESPERANTO**,  
Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, NEDERLANDO

## PACAMANTOJ !

Memoru antaŭmendi la periodaĵon "NOVA MONDO", samtempe sendante 2: — sv. kr. aŭ egalvaloron por la kostoj. — Estas tre grave ke ĝi aperu! Unika kaj Gravega artikolaro jam anoncita! — Cetere vidu la anoncon en la aprila numero de "Esperanto".

Adr.: Gunnar Rugland, ĉe Rönnell, Hornsgatan 89II, Stockholm Sv., Svedujo.

Oni ankaŭ povas mendi la periodaĵon, kaj ni poste enkasigos la monon.

## Al partoprenontoj de la „47-a”

Pacamantoj, vivreformuloj el ĉie, se vi ne partoprenos la bankedon kaj la balon mi invitas vin partopreni kunvenon en vegetara restoracio ROMA, Österbrogade 85, Kopenhago Ö (tramo 1 kaj 14 al la pordo), kie ni provos starigi supernacian organizaĵon kies celo estas krei vivreformulajn ekonomiajn pacfaktorarajn societojn (komunumojn, kolektivojn) ĉie kie estas eble. Dum la kunveno eta manĝo. Malalta enirprezo.

Certigu al vi lokon. Antaŭmendu enirbileton ĉe Gunnar Rugland, Hornsgatan 89 II, Stockholm Sv., Svedujo. ĉe Rönnell.

**Kolektanto de Esperantaj filatelaĵoj** serĉas netajn kovertojn kaj bildkartojn kun specialaj poŝt-stampoj pri Esperanto (kongresoj, ktp.). Interŝanĝe donas freŝdatajn poŝtmarkojn aŭ unuataĝkovertojn de Usono. Aĉetas precipe deziritajn erojn. Bonvolu sendi priskribon pri la kovertoj aŭ kartoj, kiujn vi volus interŝanĝi aŭ vendi.  
S-ro W. J. Franke, Rensselaer, N.Y., Usono (USA).

## Kongresaj Glumarkoj ankoraŭ aĉeteblaj ĉe UEA

Prezo: 3 Folioj (po 10 markoj) = 1,— gld.

Nova Espero!

Nova Vivo!

Nova Kulturo!

**PACO SUR LA TERO!**

Fondi idealistajn societojn, ekonomiajn kolektivojn, ĉie en la mondo, kie estas eble, estast la celo de stariganta nova organizaĵo. Per praktikado de la Pacfaktoraro en tiaj societoj oni montru ekzemplojn pri la vojo al

## PACO SUR LA TERO

pere de UNIVERSALA AMO, kiu rezultigos la celon, samtempe rimedon:

**REEN AL LA NATURO!**

Tiuj ekzemploj kontribuu al la spirita kresko kaj progreso de aliaj individuoj por ke ili alkresku al la paciga faktoraro, ĉar

**ESTAS LA SPIRITO KIU VIVIGAS!**

Interesiĝantoj sin turnu por pluaj sciigoj al Gunnar Rugland

ĉe Rönnell, Hornsgatan 89 II  
Stockholm Sv., Svedujo

samtempe sendantaj, se eble, 2 respondkuponojn aŭ egalvaloron por la kostoj.

## INFANOJ NE KONAS LIMOJN

Belega fotolibro kun teksto en Esperanto.  
Eldonis **BRUNA**, Nederlando.

Sur kvin kontinentoj infanoj estas ĉarmegaj en siaj ĝojoj, ĉagreno, ludo kaj laboro  
Konvinkiĝu mem!

Prezo:  
2,95 gld.  
(11.80 steloj)

**MENDU ĈE  
U.E.A.**

